ADA CSISZÁR

OMAĜE AL KÁLMÁN KALOCSAY

EL ABAÚJSZÁNTÓ ĜIS LA ESPERANTA PARNASO

LA PROZA VERKISTO KAJ TRADUKINTO

Kvara volumo

Budapest 2000

Ada CSISZÁR

OMAĜE AL KÁLMÁN KALOCSAY
EL ABAÚJSZÁNTÓ ĜIS LA ESPERANTA PARNASO
PRI LIA VIVO KAJ PLENA VERKARO

LA PROZA VERKISTO KAJ TRADUKINTO

Kvara volumo

Budapest 2000

Ĉiuj rajtoj rezervitaj. Budapest, 2000. Ada Csiszár.

Respondeca eldonanto: Ada Csiszár.
KAL-ĈI Dokumentaro. Budapest 2000.

Kálmán Kalocsay

(1891-1976)

ANTAŬPAROLO
Al la unua volumo

Tiu ĉi libro celas – krom la omaĝo al d-ro Kálmán Kalocsay – ke la riĉa spirita heredaĵo de nia klasikulo fariĝu komuna trezoro de la esperantistaro.

La libro enhavas plurcent indikojn de la giganta verkaro de Kalocsay. Liaj artikoloj estas listigitaj laŭ temoj, poemoj kaj tradukoj laŭ titoloj. La kunmeton riĉigas mozaikoj el la movado, kiuj pli malpli apartenas jam al la historio de Esperanto. Apud la centra figuro de Kalocsay, en la fono aperas – eĉ se kelkfoje ombre – pluaj rolantoj: parencoj, kolegoj, eminentaj kaj malpli konataj esperantistoj vivantaj en la epoko de Kalocsay.

Klasifiki tiun verkon – laŭ literatura genro – ne estus konvena, ĉar ĝi enhavas materialojn plej diversajn: bio-bibliografiajn indikojn, erojn el la verkoj de Kalocsay, eseojn, rememorojn, intervjuojn, anekdotojn, leterfragmentojn, fotojn, poemojn, citaĵojn, ktp.

La aspekton kaj la personecon de Kalocsay bone prezentas pli ol ducent fotoj kaj rememoroj de samtempuloj, kiuj havis bonŝancon renkontiĝi, kunlabori kaj esceptokaze amikiĝi kun tiu geniulo. La personeco kaj la agado de Kalocsay estis tiel multflanka, ke mi dediĉis al ĉiu "faceto" apartan ĉapitron, ene subĉapitron eĉ subsekcion. Tiu ĉi aranĝo faciligas orientiĝon al personoj, kiuj deziras ĝin studi. La temojn ĝenerale kompletigas bibliografio. Ekzemple ĉe libro-konigo estas listigitaj recenzoj kaj en subsekcio referencoj al la verko.

Laŭteme estas listigitaj verkoj de Kalocsay, kiuj aperis en revuoj disŝutite. Sen registro multaj el ili dronus en la maron de literoj, aliaj restus por ĉiam perdiĝintaj, ĉar ili kaŝiĝas sub *nekonataj plumnomoj, litersignoj eĉ anonime.* La libro fermas ankaŭ tiun breĉon. Kaj kio estas same grava: laŭ tiuj listoj oni povas facile redakti pluajn Kalocsay-librojn.

Ĉe la redaktado mi klopodis kiel eble plej registri ĉiujn publikaĵojn PRI Kalocsay, tamen jam en la komenco mi devis rezigni pri la senmanka listigo. En la gazetoj certe kuŝas artikoloj, kiuj venis nek al miaj manoj, nek al tiuj de Kalocsay.

Mi ne hezitis – el raraj, malaperintaj revuoj – kelkfoje represigi fragmentojn el artikoloj de eminentaj aŭtoroj, se tiuj bonvenis al iu temo. Ankaŭ tiuj pecoj multe helpos interesiĝantojn iom pli funde studi ian laboron aŭ ideon de Kalocsay.

La aplikata dekuma sistemo de kvar subdividoj estas simpla kaj klara:

la unua cifero indikas ĉapitron (ekzemple 5 Ĉapitro 5);
la dua cifero montras subĉapitron (5.12);
la tria cifero rilatas al sekcio de ĉapitro (5.12.1);
la kvara cifero indikas subsekcion (5.12.1.0).

Tiu ĉi sistemo ebligas precizajn referencojn de unu parto al la alia. Tio estas des pli grava, ĉar pluraj aferoj estas traktitaj aŭ menciitaj en diversaj lokoj en ie pli detale ol en aliaj.Tiel oni facile trovos ĉion rilaton al la temo, kaj oni povas kompletigi iun ajn informon. En la subsekcioj (referencoj) estas listigitaj verkoj, kiuj mallonge aŭ pretere okupiĝantaj pri la koncerna temo, entenas tamen rimarkindan penson, opinion.

Dum la laboro mi klopodis trarigardi la itineron *El Abaújszántó ĝis la Esperanta Parnaso.* Eminentaj verkistoj, amikoj kaj respektantoj de Kalocsay helpis min en tio.

Mi esperas, ke la legantoj akceptos tiun ĉi libron tiel ame, kiel ĝin kolektis, verkis kaj redaktis la kontribuantoj.

Budapest, 1998

Ada CSISZÁR

ANTAŬPAROLO
Al la kvara volumo

Akompano de la longa vivovojo de Kálmán Kalocsay kaj la listigo de lia giganta verkaro estas tiel ampleksa, ke ĉe la finredakto de OMAĜE... ŝajnis oportune aperigi la materialon po partoj. Tion ebligas ĝia laŭtema aranĝo, ĉar ĉiu tereno de la multflanka agado de Kalocsay konvenas kiel memstara libro.

En 1988 aperis la unua volumo en la vico, kiu ekde la deveno ĝis la lasta vivojaro – helpe de 65 fotoj – prezentas la homon Kalocsay, pri kiu, escepte lian Esperanto-agadon, oni scias tre malmulton.

La dua volumo, aperinta en 1999, estis dediĉita al la originala Esperanto-poeto. Konigo de liaj ok poemvolumoj, respektive 360 poemtitoloj reprezentas la poeton de la Internacia Lingvo.

En 2000 aperis la tria volumo de la grandampleksa verko. Konigo de 15 poem-volumoj kaj la listigitaj 1443 poemtitoloj prezentas la poemtradukinton de Esperanto.

La nuna volumo, la kvara en la vico, estas dediĉita al la eseisto, proza verkisto kaj tradukinto Kalocsay.

Aranĝo de la materialo kaj la aplikata dekuma sistemo de kvar subdividoj en ĉiuj volumoj estas sama. Por gardi la kontinuecon de la volumoj, la piednotoj estas numeritaj sinsekve sen interrompo.

Budapest, 2000

Ada CSISZÁR

ĈAPITRO 9

LA PROZA VERKISTO

9.1 ENKONDUKO

En sia literatura agado Kalocsay ne ambiciis eternigi sian nomon kiel novelisto kaj romanverkisto. Entute kvin noveloj* kaj unu teatraĵeto: LI KIEL ŜI** fontis el lia plumo.

Verŝajne li opiniis pli gravan taskon okupiĝi pri la demandoj de la Esperanta lingvistiko, pri la problemoj de ĝia poezio kaj gramatiko. Jes ja. La lingvo – ankaŭ Esperanto – estas tre kompleksa fenomeno kun multaj demandoj. Kalocsay profunde analizis la problemojn kaj laŭ la konkludoj li verve polemikis por akceptigi siajn tezojn.

Pri la signifo de la proza verkisto Kalocsay, plej elokvente parolas liaj eseoj kaj artikoloj ĉilibre registritaj.

Por faciligi la orientiĝon en la multnombraj prozaj verkoj de Kalocsay, ŝajnis oportune fari la jenan grupigon:

Eseoj kaj artikoloj:

Pri literaturo
Recenzoj
Portretoj
Pri la Esperanta poezio
Observ-artikoloj
Pri diversaj temoj
Pri la Esperanta gramatiko***

Kiel la listigitaj titoloj montras, Kalocsay multajn artikolojn subskribis per speŭdonimo aŭ litersigno. Sekve, ke ili ne estas ĝenerale konataj, eble ne estas superflua la konigo kaj deĉifro de tiuj enigmaj plumnomoj.

* Vd p. 39.
** Ĝi aperis en la ARĜENTA DUOPO (1937) kaj estis plurfoje prezentita en Esperanto-renkontiĝoj.
*** Estos listigataj en sekva volumo: LA LINGVISTO KAJ GRAMATIKISTO KALOCSAY.

9.1.1 Pseŭdonimoj, plumnomoj de K. Kalocsay

En la Esperanta literaturo la uzo de plumnomoj estas tradicia. L. L. Zamenhof, iniciatinto de la lingvo uzis dek pseŭdonimojn kaj kiel konate, la unua "D-ro Esperanto" poste (sen D-ro) trapasis al la lingvo.

Inter la esperantaj aŭtoroj certe Kálmán Kalocsay uzis la plej multajn plumnomojn, inter ili enigmajn litersignojn kaj "sepsigele sekretajn" pseŭdonimojn malkaŝitajn dudektri jarojn post lia morto en la libreto: A. Csiszár: SENVUALE... (1999).

Li uzis plumnomojn plej ofte sub siaj prozaj verkoj, tial ŝajnas utile listigi tiujn kaskojn kun koncizaj klarigoj ĉerpitaj el la menciita libreto. Jen:

Ócsay Kálmán: Amputita familia nomo, uzita ekskluzive por hungarlingvaj poemoj.

Kopar: Kreita el la inicialoj: K. K. Du koj, t. e. paro de K = k-paro. En la hungara lingvo kopar signifas kalva.

C. Panda: Ç estas komenclitero de Colomannus. Panda estas la familia nomo de la patrina branĉo de Kalocsay.

Vince: La dua baptonomo de Kalocsay.

C. E. R. Bumy: Modifo de la verbo: "cerbumi".

Peter Peneter: Formita el la baptonomo Peter kaj el la verbo: "penetri". Kreita por kamufli la aŭtoron de SEKRETAJ SONETOJ (1932).

M. Alice Pik: Ĝi signifas: malice piki.

Alex Kay: Kreita per alivicigo kaj iom da fonetika modifo de la literoj en la familia nomo. Ĝi efikas tute originala, persona nomo.

K. Stelov: Elpensita rusa nomo, naskita en la tria periodo de *Literatura Mondo* (1947-1949). Ĝia tasko estis "internaciigi" la revuon, ĉar en tiu tempo mankis kunlaborantoj el Sovetunio.

Phil O' Gyn: T. e. : Amiko de virinoj.

Ista Makler: Modifo de la Esperanta vorto: "makleristo".

Emiano Imby: Elpensita ordinara nomo por la verko: LA DEKDU NOKTOJ DE SATANO (1990).

Litersignoj

A. K. Monogramo de la pseŭdonimo **Alex Kay.**

CH. P. Iom modifitaj komenc-literoj de la pseŭdonimo **C. Panda.**

Litersignoj

i. k.	Elparola formo de la lasta litero de la familia nomo kaj la unua litero de la baptonomo de Kalocsay Kálmán.
K.; K.K.; k.k.	Ofte uzitaj kaj konataj litersignoj de Kalocsay.
K. de K.	Komencliteroj de Kálmán Kalocsay kun "de", kiu montras nobelan devenon.
Kr.	La unua kaj la lasta litero de la pseŭdonimo **Kopar.**
K. ST.	Monogramo de la pseŭdonimo **K. Stelov.**
-kvk-; KVK	Komencliteroj de Kálmán Vince Kalocsay.
lc.	La du mezaj literoj de Kalĉi, t. e. karesnomo de Kálmán.
(V)	Komenc-litero de la dua baptonomo de Kalocsay, t. e. Vince.
V.K.	Komenc-literoj de la antaŭnomoj de Kalocsay: Vince Kálmán.
(xy)	La du lastaj literoj de la pseŭdonimo **Alex Kay.**
-y; (y); (Y)	La antaŭlasta litero de la latina alfabeto estas la lasta litero en la familia nomo de Kalocsay.

* * *

9.2 LA ESEISTO KALOCSAY

En 1971 Kalocsay iĝis 80-jara. Ĉi-okaze lia amiko kaj adepto en la Esperanto-literaturo, L. Tárkony intervjuis lin kaj demandis pri liaj projektoj. Responde Kalocsay inter aliaj menciis: "Mi povas kunmeti libron de eseoj el miaj artikoloj aperintaj dise dum jardekoj."[113]

Bedaŭrinde la morto ne permesis al Kalocsay efektivigi tiun planon. Liaj multnombraj eseoj, artikoloj, recenzoj restis dise en diversaj revuoj. Unu el la taskoj de la juna Esperanta generacio estas kolekti kaj eldoni la eseojn de Kalocsay, ĉar se ni neglektos kaj forgesos tiun flankon de lia literatura laboro, restos nekonata (almenaŭ por la sekvaj generacioj) signifa parto de lia multfaceta talento.

Kalocsay estis ne nur perfekta tradukisto, tenera poeto, preciza lingvisto, literatura teoriisto, sed ankaŭ publicisto, eseisto, kiu eĉ per mallonga literatura verko povis esprimi originalajn ideojn kaj profundajn pensojn.

Se en la poemoj de Kalocsay ni vidas homon kun riĉa emocio kaj vasta filozofia rigardo pri la eternaj problemoj de la mondo kaj la vivo, se en liaj tradukoj ni sentas personon kun solida kaj respekta lingva erudicio, pere de liaj eseoj kaj artikoloj, ni ekkonas alian Kalocsay – la publiciston.

Kalocsay verkis la poet-gvidilon PARNASA GVIDLIBRO (kun Waringhien) kaj poemaron IZOLO, sed li neniam izoliĝis en la nebulo de Parnasa pinto. Li rigardis reale kaj objektive al la Esperanta literaturo, konis ĝian kvaliton kaj ĝiajn multnombrajn problemojn.

Kalocsay havis ambicion ne nur evoluigi la Esperantan literaturon, sed ankaŭ popularigi ĝin. Liaj artikoloj plej adekvate respegulas tiujn liajn strebojn. En tiu ĉi senco karaktera estas lia artikolo: *Kion fari por la Esperanta literaturo*[114].

La baza ideo de la artikolo estas la signifa rolo de la Esperanta literaturo, kaj la konstato de Kalocsay – kiel ankaŭ la devizo de Zamenhof – estas kategoria: "Floras la literaturo, floras ĉio, falos la literaturo, falos ĉio." En tiu ĉi artikolo Kalocsay difinis ankaŭ la rolon de la scienco, sed kiel sciencisto, fakulo en sia profesio li tre bone konis la principojn de la scienco kaj li amare konstatas: "... sciencoj pli kaj pli disfakiĝas kaj la rapidega evoluo baldaŭ arkaikigas la faklibrojn. Kiel la Esperanta libroeldono povus fari tiun vetkuron kun la tempo?"

Tiu ĉi artikolo estas grava por ni, ĉar en ĝi Kalocsay la plej klare esprimas sian firman konvinkon, ke nur per la literaturo la lingvo prosperas. En la artikolo Kalocsay parolas detale pri la nesufiĉe vasta organizo de la literatura agado. Li starigas kvar punktojn kaj strebas el ĉiuj flankoj observi la problemojn: de la larĝa merkatesploro ĝis la plialtigo de la lingva nivelo. La artikolo montras ankaŭ ke Kalocsay neniam kreis arton por arto. Li ĉiam pensis pri la multnombraj ŝatantoj de la Esperanta literaturo.

Kalocsay detale klarigas kiamaniere oni devas popularigi la Esperanto-literaturon, ĉar ĝi estas nova literaturo en la mondo kaj la homoj ankoraŭ ne konas ĝian valoron kaj signifon.

En tiu ĉi artikolo delikate, per vera ĵurnalista sperto, Kalocsay aludas al kelkaj el la plej talentaj esperantaj verkistoj: Baghy, Adamson, Auld, Boulton, Hohlov, Emba kaj aliaj. Tiu ĉi artikolo respegulas la publicistan talenton de Kalocsay. La frazoj estas mallongaj, la esprimoj kristale klaraj, la komparoj trafaj.

I. Eseoj pri la Esperanto-literaturo

La artikoloj de Kalocsay dediĉitaj al la problemoj de la Esperanto-literaturo havas grandajn signifojn ne nur por la esplorantoj de ĝia kreado, sed por ĉiuj, kiuj interesiĝas pri la literatura historio de Esperanto.

La kontribuo de Kalocsay al la literaturo de Esperanto estas tre ampleksa, sed nun, kiam ni

provas analizi ĝin, ni konstatas, ke Kalocsay preferis la problemojn de la originala poezio al la problemoj de la originala beletro, sed tiu tute ne signifas, ke li estis indiferenta al la problemoj de nia originala prozo.

La originala Esperanta prozo ĉiam estis kaj restas en pli malbona stato ol la la originala Esperanto-poezio. En sia eseo: *La Esperanta novelo*[115] Kalocsay atente analizas kelkajn problemojn de la originala beletro. Ankaŭ por tiu ĉi eseo Kalocsay havas konkretan motivon. Tio estas la libro: 33 RAKONTOJ eldonita de Stafeto en 1964 kaj havanta la subtitolon LA ESPERANTA NOVELARTO. Post la apero de tiu ĉi libro en la Esperanta literaturo ekflamis grandaj diskutoj. La libro 33 RAKONTOJ similas al bunta bukedo, ĉar en ĝi estas prezentitaj preskaŭ ĉiuj Esperanto-novelverkistoj. En la menciita eseo Kalocsay ne hezitis konstati la modestan kvaliton de la originala prozo, sed li atentigas, ke oni devas serioze rigardi al ĝi. "La fakto estas, ke ekzistas legeblaj noveloj originalaj, kia ajn miraklo tio estas."

Kalocsay rememorigas, ke por Esperanto-aŭtoroj ne ekzistas perspektivoj por honorario, eĉ ne certa espero por publikigo de iliaj verkoj. Nur per kelkaj frazoj Kalocsay karakterizas la aŭtorojn, sed tiuj karakterizoj estas reliefaj kaj precizaj. Li klare montras, ke Esperanto-aŭtoroj forte diferenciĝas unu de la alia laŭ siaj ideoj, mondkonceptoj kaj emocioj. Ili havas diversajn stilojn kaj el diversaj, eĉ kontraŭaj anguloj ili observas la mondon kaj konfliktojn en la homa animo.

Kalocsay trafe karakterizas ekzemple la verkistan talenton de Ferenc Szilágyi: "... li rigardas siajn novelfigurojn kiel oro-kora oĉjo." Pri Stelan Engholm li diras: "Ankaŭ li estas humanisto, sed lia tro konsideremo lin devigas rigardi la mondon kun sobra realismo."

Per tiu ĉi artikolo Kalocsay pruvas, ke en la originala Esperanto-beletro ne mankas talentaj aŭtoroj kun originalaj ideoj kaj variaj temoj, sed la kaŭzo de la malrapida evoluo de la prozo estas la multnombraj eksteraj cirkonstancoj, kiuj ĝenerale baras la vojon de Esperanto-literaturo.

Tiu ĉi artikolo ne priskribas nur la staton de la Esperanta beletro, sed ĝi montras, ke Kalocsay reale karakterizas la fenomenon: "Esperanto-literaturo". Kalocsay vidis, ke la esperanto-prozo vivas, kaj malgraŭ ke li ne faris prognozojn pri ĝia estonto, li kredis en ĝia evoluo.

Ni ne povas imagi ekziston de iu ajn literaturo, se ne ekzistus literatura organo, en kiu fokusiĝas la tendencoj de ĝia evoluo. En 1908 en Budapeŝto aperis la literatura revuo Nyugat (Okcidento), kiu estis unu el la gvidaj ĵurnaloj en la hungara literaturo. Ĉirkaŭ tiu ĵurnalo kolektiĝis multaj junaj talentaj artistoj, kiuj strebis proklami revolucion en la literatura arto. Similan rolon por la Esperanta literaturo kaj kulturo ludis la revuo *Literatura Mondo*. Unu el la plej talentaj eseoj de Kalocsay estas: *La tri vivoj de Literatura Mondo*[116]. En ĝi Kalocsay trarigardas la vojon de tiu ĉi unika revuo laŭ sia karaktero en la Esperanto-historio. Li ne deziras analizi kaj karakterizi la revuon, li simple rememoras en kronologia vico pri ĝiaj aperoj kaj malaperoj, pri ĝiaj rubrikoj kaj artikoloj, pri ĝiaj redaktoroj, sed tiuj rememoroj estas tiel fortaj, ke Kalocsay, kiu preferas en siaj artikoloj la analitikan, eĉ iomete malvarman tonon, ĉi tie ne povas kaŝi sian spontanan emocion. Kiam la legantoj legas tiun eseon, ili havas la imagon, ke Kalocsay verkis ĝin per unu spiro. La frazoj kvazaŭ flugas unu post la alia. La stilo estas klara kaj eleganta. *La tri vivoj de Literatura Mondo* ne estas eseo, ĝi estas konfeso pri longjara konscia kaj obstina laboro. Ĝi estas konfeso de homo, kiu dediĉis sian talenton al la nobla celo.

En tiu ĉi eseo Kalocsay ne donas konsilojn kaj ideojn, li simple, modeste rakontas pri la obstina agado de multaj konataj kaj nekonataj personoj de Esperanta literaturo kaj Esperanto-movado, inter kiuj ankaŭ li estis unu el tiuj apostoloj.

II. Eseoj pri Esperanto–aŭtoroj

Multajn studetojn Kalocsay dediĉis al personoj, kiuj en diversaj anguloj de la mondo fervore laboris por la prospero de Esperanto. Tiuj esperantistoj estis juristoj, pastroj, doktoroj de la medicinaj sciencoj aŭ simplaj laboristoj, sed ĉiujn ilin kunligis la problemoj de la *Internacia Lingvo.*

En siaj eseoj Kalocsay rakontas pri ilia Esperanto-laboro ne nur kun amika amo kaj simpatio, sed li montras ilian realan lokon en la historio de Esperanto-movado. Tiuj ĉi eseoj povas esti modeloj en Esperanto-literaturo, ĉar en ili la emocio kolorigas la faktojn, kaj ili ne aspektas kiel sekaj, sensukaj biografioj.

Certe ne nur Kalocsay demandis sin, kiel Esperanto venkis? Kial ĝi restis vivanta post la morto de sia "iniciatoro", kial ĝi povis transvivi la du mondmilitojn, dum aliaj multnombraj lingvoprojektoj restis nur projektoj?

Al tiuj ĉi demandoj Kalocsay respondas en la eseo: *Zamenhofa tago*[117]. Tiu ĉi eseo estas interesa por la historiistoj de la Esperanto-movado, ĉar en ĝi Kalocsay karakterizas la tri gravajn faktorojn, per kiu Esperanto venkis, kaj trovis multajn adeptojn.

Unu kaj plej grava kaŭzo – laŭ Kalocsay – estis la internacieco. Zamenhof dediĉis la lingvon al la servo de la paco kaj la amo inter la popoloj. Due, li substrekis la fakton, ke Zamenhof dekomence destinis la lingvon por literaturo kaj Kalocsay klare difinis tion: "La lingvo kreis la literaturon, la literaturo kreis la literaturan lingvon." Trie, Zamenhof faris nur la lingvo-fundamenton kaj konfidis ĝian riĉigon kaj poluradon al la adeptoj.

Ankaŭ tiu ĉi eseo estas konciza, sed per sia logiko kaj konkludoj ĝi efikas al la legantoj. Tiu ĉi eseo montras ankaŭ, ke Kalocsay havis realan imagon pri la avantaĝoj de la *Internacia Lingvo*, analizis ilin en dialektika unueco kaj ne subtaksis eĉ unu el ili.

La *Internacia Lingvo* estas sufiĉe komplika kaj kompleksa fenomeno. Ĉiuj erarus, se ili provus analizi la problemojn de Esperanto nur el unu flanko. Tiuj ĉi problemoj postulas profundan kaj seriozan esploron. Oni sciance, el sociologia kaj psikologia vidpunktoj devas esplori la motivojn, kiuj allogas la homojn al la Esperanto-movado.

La personeco de Kazimierz Bein multfoje okupis la atenton de la esperantistoj kaj verŝajne ankoraŭ longe okupos la pensojn de la historiistoj de Esperanto-movado, ne nur tial, ĉar Kabe restis unua stilisto esperantista en la historio de Esperanta literaturo, sed ankaŭ tial, ĉar li forlasis Esperanton ĉe la kulmino de sia gloro. En sia eseo: *Kabe centjara*[118], Kalocsay lumigas la enigman naturon de Kabe. Jam en 1931 Kalocsay verkis rondelon en RIMPORTRETOJ: *Ho, Kabe, Kabe, Kabe!*, sed en tiu ĉi eseo Kalocsay detale observas la Esperanto-laboron de Kabe kaj serĉas la kaŭzon de lia definiva forlaso de Esperanto.

Kalocsay diras: "Estus tamen maljusta rigidiĝi en la rankoro pro tio, ĉar dizertis granda donanto, laboranto, efikanto, dum facile ni preteras la dizerton de tiuj, kiuj faris nenion signifan aŭ apenaŭ ion." En tiu portreto Kalocsay observas ne nur la tradukistan talenton de Kabe, sed ankaŭ lian personecon. Kabe estis homo, kiu ĉiutage kvar-kvin horojn laboris por Esperanto kaj lia devizo estis "ĉion aŭ nenion". Eble Kabe tial rezignis pri Esperanto kaj dediĉis siajn fortojn al sia okulkuracista profesio.

Tiu ĉi eseo estas interesa ne nur ĉar ĝi lumigas unun el la plej interesaj figuroj en la Esperanta movado, sed ankaŭ el literatura vidpunkto. En ĝi Kalocsay prezentas sian propran opinion pri la personeco de Kabe kaj montras lian signifon por Esperanto-literaturo. Per sia fleksebla kaj viva lingvo Kalocsay prezentas reliefan portreton pri Kabe.

Kalocsay bone konis sian kunlaborantojn kaj verkis pri ilia Esperanto-laboro kelkajn eseojn. Tiuj ĉi verkaĵoj havas apartan valoron, ĉar kiu pli bone povus rakonti al ni: pri Tárkony, Szilágyi aŭ Bodó ol Kalocsay. Ni nur povas nur bedaŭri, ke tiuj ĉi eseoj ne havas karakteron literaturaj studoj, sed malgraŭ ilia koncizo, ili donas realan imagon pri la plej talentaj Esperanto-verkistoj.

La duan vivon *Literatura Mondo* ŝuldas al la iniciatema naturo de Vilmos Bleier, kaj al li Kalocsay dediĉis grandan eseon. Nun ni ne tre ofte rememoras pri Bleier kaj tial la eseo de Kalocsay[119] havas apartan signifon. Kiam ni denove tralegas tiun ĉi eseon, ŝajnas al ni, ke ĝi estas dediĉita al la problemoj de la *Literatura Mondo*. Kalocsay priskribas la renaskiĝon de la revuo en 1931 kaj la vastan libroeldonadon dum la dua periodo de la revuo, sed malantaŭ la konkretaj faktoj la legantoj sentas la modestan kaj aktivan figuron de Bleier.

Pere de tiu eseo ni vidas la talenton de Kalocsay krei realajn kaj vivajn portretojn pri siaj samtempuloj. Kalocsay ne parolas rekte pri la pozitivaj trajtoj en la karaktero de Bleier, sed li reale priskribas lian vastan Esperanto-agadon kaj tiamaniere la legantoj mem povas formi la veran bildon pri tiu arda apoganto de la Esperanto-kulturo.

En tiu ĉi eseo eĉ la stilo de Kalocsay impresas nin, en ĝi ni malkovras novajn elementojn. Malgraŭ, ke Kalocsay alte estimas la agadon de Bleier, li pentras lian portreton precize, kaŝante sian emocion. Nur en la fino de la eseo per tre bela, poezia komparo li montras siajn profundajn amikajn sentojn: "Li ne verkis tiel varmajn kaj spicajn ampoemojn, kiel Heine, kies tombon la francaj virinoj ĝis nun ornamas per floroj, sed se el iu esperantis/in/o venus en la kapon meti florojn sur lian tombon, eble la 14-an de Majo, li/ŝi ne malŝparus la floron sur la tombon de senindulo."

Kaj tio estas la plej modesta, sed la plej homa pritakso de la sindona Esperanto-agado de Vilmos Bleier.

La figuro de Ferenc Szilágyi forte allogis Kalocsay kaj ne nur unufoje li dediĉas sian plumon al la ĵurnalisto, verkisto, Esperanto-instruisto Szilágyi. En la eseo: *La ĉiomflankulo*[120], Kalocsay varme kaj amike parolas pri tiu homo, el kiu radias fido kaj bonvolo. En la personeco de Szilágyi Kalocsay vidas ne nur la homon kun granda koro, sed la spertan organizanton, inspiran verkiston kaj aktivan redaktoron. Kalocsay per profesia sperto difinas la plej karakterizajn trajtojn de lia multflanka talento. En la eseo pri Szilágyi, Kalocsay prezentas kelkajn interesajn indikojn pri lia vivo kaj formas reliefan psikologian portreton de tiu originala Esperanto-verkisto. Certe la eseo de Kalocsay pri Szilágyi multe helpos al esplorantoj de Esperanto-literaturo en ilia laboro.

Foje en intervjuo Tárkony menciis: "De kvardek jaroj mi laboras kune kun Kalocsay ĉe *Literatura Mondo* kaj *Hungara Vivo*." Tio estas vere longa periodo, dum la homoj povas bone koni unu la alian. Ĉiuj, kiuj konas la Esperanto-literaturon, bone scias la signifan rolon de Lajos Tárkony por tiu ĉi literaturo. Pri Tárkony Kalocsay skribis kelkajn eseojn kaj artikolojn, recenzis liajn poemojn, sed unu fakto impresas nin. Se la karakterizoj de Kalocsay pri Szilágyi, Bodó, aŭ Szathmári estas kategoriaj kaj koncizaj, liaj karakterizoj pri Tárkony ĉiam estas tre ampleksaj. Kiam oni legas ilin, oni konstatas, ke Kalocsay en la talento de Tárkony ĉiam malkovras novajn kaj novajn flankojn. Kalocsay profunde sentas lian talenton, sed neniam provas precize karakterizi ĝin. En sia antŭparolo de la poemaro de Tárkony: SOIFO (1964) Kalocsay skribas: "Ĉu nomi lin polurita romantisto? Pli facile diri, kiel ne nomi lin. Certe li estas tro ŝveba por esti realisma kaj tro tera por esti idealisma. Li estas li mem..." Sed tio ne signifas, ke Kalocsay ne difinis la rolon de Tárkony en Esperanto-literaturo. Li konis la riĉe emocian naturon de Tárkony kaj strebis respeguli ĝin en siaj eseoj. Malgraŭ, ke en siaj poemoj Tárkony malkovris la profundon de sia tenera animo, Kalocsay deziris montri la radikon de tiu lirika tenero, deziras montri la delikatan limon inter la poeto Tárkony kaj la kritikisto Tárkony, la delikatan limon inter la realo kaj idealo en la animo de tiu milda poeto. Eble Kalocsay kelkfoje dubis, ke li sukcesis fari tion, sed ni pensas, ke en la eseoj li prezentis la verkistan Tárkony pli bone ol verŝajne ĉiuj, kiuj en la estonto okupiĝos pri la temo.

Kalocsay skribis portretojn ne nur por plenumi amikan devon (koncerne la samtempulojn), sed lin gvidis la nobla penso, rakonti pri ili al la junaj Esperanto-generacioj.

Tiuj eseoj konservis multe el la flamo de a nobla koro de Kalocsay. Li rakontas pri siaj amikoj kaj kolegoj amike. Li ne deziras ilin fari herooj aŭ ornami ilin per aŭreolo de la apostoloj. Simple kaj nature li rakontas pri iliaj seniluiziĝoj en la vivo aŭ pri iliaj malgrandaj ĝojoj. Lia eseo pri Emba ekzemple sonas, kiel trista melodio pri la malfacila kaj malĝoja vivo, sed la optimisma naturo de Emba ravas Kalocsay-n kaj tiu optimismo kvazaŭ penetras ankaŭ en la eseon. Kalocsay vidis, ke en la versaĵoj de Emba ne mankas talento, en lia romano: MARIA KAJ LA GRUPO estas multaj bonaj flankoj kaj Kalocsay montras tion ankaŭ al la legantoj.

En la eseo de Kalocsay dediĉita al Paŭlo Balkányi, ni vidas kvazaŭ antaŭ ni unun el la plej aktivaj hungaraj esperantistoj, tiel majstre Kalocsay pentras lian portreton.

Tiuj eseoj priskribas ne nur la homojn, sed en ili la legantoj trovas multajn konkretajn indikojn pri la Esperanta movado. En tiuj eseoj Kalocsay esprimis sian opinion pri la problemoj de Esperanto-literaturo. En ili Kalocsay karakterizis la talenton de tiuj, kiuj evoluigis tiun literaturon. Tiuj eseoj estas modelo de la modesto. Kalocsay parolas pri la homoj, kun kiuj li estis kune dum jardekoj, sed li nek vorton mencias pri si mem. Li preferas observi la personojn el la fono kaj precize priskribi ilin. Li estimas la talenton de siaj amikoj kaj ilian decidon dediĉi sin al Esperanto. Tiun estimon li sugestas ankaŭ al la legantoj.

Se ni analizas tiujn eseojn el ilia literatura flanko, ni devas konfesi, ke kiel literaturaj verkoj havas modestajn kvalitojn. Ilia stilo estas perfekta, la pensoj esprimitaj en ili estas klaraj, profundaj, sed ili suferas ĝenerale el kompona vidpunkto. Ofte mankas fundamenta ideo, kiu devas unuigi la pensojn. Kelkaj el ili estas nur literaturaj skizoj kaj en multaj mankas la ĝeneraligoj.

Sed la celo de Kalocsay estis simple konfesi pensojn pri organizaj problemoj aŭ rememori modeste pri kelkaj personoj, kiuj lasis helan spuron en nia literaturo. En tiuj eseoj lia erudicio donis ankaŭ faktojn, kiuj helpas pri la klarigo de la diversaj problemoj en nia movado kaj literaturo. Nun por ni tiuj eseoj ludas ankaŭ alian rolon. Per ili ni konstatas multajn interesajn trajtojn el la karaktero de Kalocsay kiel homo kaj verkisto. Ili riĉigas kaj kompletigas lian figuron.

III. Eseoj pri hungaraj verkistoj

Kalocsay per siaj tradukaĵoj prezentis al la esperantistoj ne nur la riĉan verkadon de la plej talentaj hungaraj verkistoj – klasikaj kaj nuntempaj – sed en eseoj li priskribis la atmosferon en kiu ili kreis. En multaj eseoj Kalocsay klarigas la plej karakterajn trajtojn de la hungara literaturo. Lia celo estis, ke la fremdlandanoj ne nur intuicie perceptu apartajn verkojn kaj aŭtorojn, sed ankaŭ ekkonu la evoluon de la hungara literaturo. Per liaj eseoj la legantoj enrigardas en la komplikan kaj interesan mondon de la hungaraj verkistoj, sed ĉi tie ni analizos nur la eseojn dediĉitajn al Sándor Petőfi kaj Endre Ady – al la du centraj figuroj de la hungara poezio.

Preskaŭ 55 jarojn okupiĝis Kalocsay pri la tradukoj de Petőfi-poemoj. En 1970 aperis Esperantlingve granda Petőfi-volumo: LIBERO kaj AMO. La enkonduko de la poemaro estas nur 12 paĝoj, sed pri ilia preparo Kalocsay diris jenon: "En la enkonduko helpis min per pluraj fontoj, unuavice per la biografio Sándor Petőfi de Gyula Illyés, aperinta ankaŭ franclingve. Tiu 682 paĝa libro metis al mi grandan malfacilaĵon: tre ofte ĝiaj paĝoj allogis min tiom, ke nur pene mi povis ne algluiĝi kaj ne traduki ĉion laŭvorte."[121]. El tiu konfeso ni komprenas la malfacilan taskon prezenti la vivon kaj verkadon de la granda hungara poeto per la literatura formo – eseo. Tiu malgranda eseo estas grava, ĉar malgraŭ, ke ĝi sonas kurioze, eble multaj konatiĝos kun tiu poeto pere de la esperanta traduko de liaj poemoj.

En tiu ĉi eseo Kalocsay devis montri la epokon, kiu naskis la poeton, devis prezenti ankaŭ

la cirkonstancojn en kiu li kreis, devis prezenti la ideojn de liaj poemoj kaj diri kelkajn vortojn pri la poezia talento de Petőfi, kaj krom tio la eseo devis esti konciza, ĉar la poeto plej bone prezentiĝas per siaj versaĵoj. Per tiu ĉi eseo Kalocsay sperte enkondukas la legantojn en la krutan, sed spirite riĉan vivon de Petőfi. En ĝi la epoko, la tempo, en kiu naskiĝis kaj vivis Petőfi, estas nur kiel fono kaj en la centro estas la figuro de la poeto. Kalocsay trarigardas preskaŭ la tutan vivon de Petőfi; de lia naskiĝo ĝis la heroa pereo. Diversajn momentojn el tiu dinamika kaj anhela vivo Kalocsay prezentas per karakteraj citaĵoj de la koncernaj poemoj. Tiamaniere Kalocsay ne nur kolorigas la enkondukon, sed donas ankaŭ indikojn pri la momentoj dum kiuj naskiĝis la diversaj poemoj de Petőfi. En la eseo Kalocsay tiel pentras la figuron de la genia poeto, kiam ni legas liajn versaĵojn, tiu figuro fariĝas antaŭ niaj okuloj pli viva, kaj pli reliefa.

Kalocsay tradukis multajn poemojn de la alia granda hungara poeto Endre Ady. En sia eseo en la poemaro: LA MORTO DE ĈIELARKO (eldonita de Hungara Esperanto-Asocio 1977), Kalocsay diras pri li: "... de post Petőfi la plej granda poezia kreanto, la plej signifoplena kaj grandformata fenomeno en la hungara liriko."

Tiujn enkondukajn frazojn pri la talenta poeto, Kalocsay pruvis per adekvataj tradukoj. Sed ne nur la poemoj de Ady elvokas intereson. Interesa estas ankaŭ lia mallonga, sed riĉenhava vivo, kaj tiun vivon Kalocsay prezentas per la eseo. Ankaŭ en tiu eseo Kalocsay ne strebas priskribi detalan biografion de la poeto. Lia celo ne estas science analizi la ampleksan filozofian verkadon de Ady. Kalocsay deziras nur per kelkaj biografiaj indikoj trarigardi lian vivon kaj montri la fontojn de lia profunda homa poezio. Kalocsay deziras nur prepari la legantojn por pli atenta legado, ĉar Ady estas tre originala kaj tre hungara poeto. Kalocsay diras pri li: "... kreis por si apartan poezian lingvon kaj apartan mondon de simboloj, eĉ apartan prozodion: la akcenton de liaj poemoj difinas la senco, sed oni sentas en ĝi ankaŭ la malnovan hungaran verspulson kaj la tamburetadon de la tempomezura metriko."

La verkado de Ady estas fenomeno ne nur en la hungara, sed ankaŭ en la monda literaturo, sed tiu krea laboro ne ĉiam ricevis realan pritakson. La diskutoj pri la valoro de liaj poemoj daŭris dum jardekoj. Per sia eseo Kalocsay enrigardis en la riĉe emocian animon de Endre Ady. Per sia eseo Kalocsay tuŝas la plej tenerajn kordojn de lia animo kaj tiel la eseo similas al eta lirika melodio, kiu finas per iomete amara akordo: "Krom tio – li estis tre granda poeto."

La kreadagado de tiuj verkistoj profunde emociis Kalocsay-n. Li multfoje legis kaj tralegis iliajn verkojn. Kiam li tradukis iliajn poemojn aŭ novelojn, li penetris en ĉiun ilian strofon aŭ linion. Li detale kaj profunde konis ilin, li parolas pri ili kompetente. Per tiuj eseoj Kalocsay montras al la legantoj: kiamaniere li komprenas la poemojn de Petőfi, Madách aŭ Ady. Kian valoron li vidas en iliaj verkoj kaj ankaŭ per tiuj mallongaj eseoj li prezentas ilian talenton.

En la diversaj naciaj literaturoj ekzistas multaj eseoj pri elstaraj naciaj aŭtoroj, sed bedaŭrinde malmultaj el tiuj eseoj estas tradukitaj Esperantlingve. Tio estas vera manko, ĉar per similaj eseoj la Esperanto-legantoj povus ekkoni multajn aŭtorojn kaj iom pli bone kompreni iliajn verkojn.

Ni ne neglektu la originalajn eseojn de Kalocsay pri hungaraj verkistoj, ĉar ankaŭ ili konservas la perfektan Kalocsay-stilon, liajn profundajn konojn pri la hungara literaturo.

La eseoj de Kalocsay ne estas la plej karaktera parto de lia kreado, sed tiuj eseoj gardas valorajn pensojn, karajn portretojn, originalajn ideojn... Ankaŭ en ili enestas Kalocsay.

Georgi MIHALKOV

113 Hungara Vivo 1971:3, p. 4-5.
114 Hungara Vivo 1971:3, p. 6-7.
115 Hungara Vivo 1974:1, p. 5-6.

116 Hungara Vivo 1972:4, p. 4-5.
117 Hungara Fervojista Mondo 1967:4, p. 49-50.
118 Esperanto 1972/103.
119 Hungara Vivo 1968:4, p. 1-3; repr. en Budapeŝta Informilo 1978:5, p. 4.
120 Hungara Vivo 1975:5, p.11.
121 Postnotoj de LIBERO kaj AMO p. 249.

9.3 ESEOJ KAJ ARTIKOLOJ PRI LITERATURO

Antaŭparolo. En: KANTANTA KAMPARO.
101 Hungaraj popolkantoj. Trad. K. Kalocsay. Szeged: Petro Turzó 1922. 45 p. (p. 3).

Al la legantoj. Prologo. Naskiĝis Literatura Mondo.
LM 1922/1-3.

Antaŭparolo kaj **Rimarkoj.** En: I. Madách: LA TRAGEDIO DE L' HOMO. Drama poemo. El la hungara originalo trad. K. Kalocsay. Budapest: Hungara Esperanto-Instituto 1924. 237 + XXIV p. (p. III-VIII).

Az eszperantó és az irodalom. (Esperanto kaj literaturo). En: ESZPERANTÓ ÉVKÖNYV (Esperanta Jarlibro). Red. L. Kökény. Budapest: Literatura Mondo 1931. 32 p. (p. 19-20).

Saluto kaj salutoj. Prologo. Renaskiĝis Literatura Mondo.
LM 1931/1. Anonime.

Antaŭparolo. En: F. Szilágyi: TRANS LA FABELOCEANO... Noveloj. Budapest: Literatura Mondo 1931. 135 p. (p. 5-6).

Enkonduko. En: J. W. Goethe: ROMAJ ELEGIOJ — LA TAGLIBRO. El la germana trad. K. Kalocsay. Budapest: Literatura Mondo 1932. 80 p. (p. 5-7).

Antaŭparolo. En: HUNGARA ANTOLOGIO. Poemoj kaj noveloj de 51 verkistoj. Trad, K. Kalocsay, J. Baghy, K. Bodó, L. Halka, F. Szilágyi, L. Totsche. Red. K. Kalocsay. Budapest: Literatura Mondo 1933. 470 p. (p. 5-6).

Antaŭparolo. En: Dante: INFERO. Unua parto de la DIA KOMEDIO. El la itala trad. K. Kalocsay. Budapest: Literatura Mondo 1933. 289 p. (p. 5-8) Represo ampleksigita per postparolo de G. Waringhien kaj notoj de G. Silfer. La Chaux-de-Fonds: Literatura Foiro 1979. 292 p.

Antologioj en Esperanto. En: ENCIKLOPEDIO de ESPERANTO. Red,. L. Kökény—V. Bleier. Budapest: Literatura Mondo 1933-1934. 599 p. + 290 fotopaĝoj. (p.20-21).

Alvoko pri Nova Krestomatio. Pri la bezono de "Nova ekzercaro". Kun E. Pfeffer.
LL 1934:3, p. 45.

Antaŭparolo. En: DEKDU POETOJ. Red. K. Kalocsay. Budapest: Literatura Mondo 1934. 126 p. (p. 5-14).

Modelo de kritiko.
LL 1934:4, p. 5. M. Alice Pik.

La perspektivoj de la Esperanta Literaturo. Prelego en la XII-a Somera Universitato en Vieno 1936. Presita en la vol.: "XII-a SOMERA UNIVERSITATO". Wien: Albrecht Dürer Verlag 1936. Repr. en: DEK PRELEGOJ DE K. KALOCSAY. Budapest: Hungara Esperanto-Asocio. 1985. 126 p. (p. 55-70).

Trian jaron. Komencas la trian jaron la gazeto Lingvo-Libro.
LL 1937:1, p. 1. Anonime.

Ĉirkaŭ "La rifuĝejo". Rimarkoj al la artikolo de N. Kurzens (LL 1937:1, p. 1) pri la malfortaj flankoj de la Esperanta literaturo.
LL 1937:3-4, p. 1. (-y).

Antaŭparolo. En: H. Valliene: ĈU LI? I. vol. Budapest: Literatura Mondo 1938. 195 p. (p.1).

Antaŭ la "Nova Krestomatio".
LL 1938:1, p. 1-2. Anonime.

Antaŭparolo. En: NAŬ POETOJ. Antologieto. Red. K. Kalocsay. Budapest: Literatura Mondo 1938. Eldonita en Saarbrücken: Iltis Eldonejo 1989. 78 p. (p. 3-5). Kun postparolo de A. Csiszár kaj bio-bibliografiaj notoj de R. Haupenthal.

Tria periodo. Prologo. Renaskiĝis Literatura Mondo.
LM 1947/1-2.

Antaŭparolo. En: S. Petőfi: JOHANO LA BRAVA. Popolfabelo en versoj. El la hungara trad. K. Kalocsay. Dua, tralaborita eldono. Budapest: Literatura Mondo 1948. 65 p. (p. 3-5).

Rimarkoj kaj **Notoj.** En: K. Kalocsay: EZOPA SAĜO. 77 fabloj verse reverkitaj. Kopenhago: Koko 1956. 127 p. (p. 119-125). Fotorepreso: Saarbrücken: Artur E. Iltis 1978.

Preteksto de antaŭparolo. En: S. Szathmári: VOJAĜO AL KAZOHINIO. Paris: Sennacieca Asocio Tutmonda 1958. 315 p. (p. 5-10).

Esperanto kaj literaturo. Prelego en Miskolc 1961.10.26. Presita en: DEK PRELEGOJ DE K. KALOCSAY. Budapest: Hungara Esperanto-Asocio 1985. 126 p. (p. 117-121).

Pri la "Inferiro de Istar".
MK 1963:3, p. 78-79.

Skizo de Esperanta literaturhistorio. Kunlaboris: P. Balkányi kaj H. Vatré. En: GVIDLIBRO POR SUPERA EKZAMENO II. Red. A. Pechán. Budapest: Hungara Esperanto-Asocio 1964, 1966, 1968. 190 p. (p. 85-159).

Iom da komento al la poemo "Pygmalion" de P. Ovidius Naso.
MK 1965:11, p. 49.

Az eszperantó és az irodalom (Esperanto kaj literaturo).
Élet és Irodalom (Vivo kaj Literaturo) 1965.12.11. Repr. en: EMÉ '74 (Jarlibro de Esperanto Magazin). Budapest: Hungara Esperanto-Asocio 1974. 240 p. (p. 214-219).

Pri la "Unua Eklogo" de Vergilius.
MK 1965:13, p. 99.

Postparolo. En: W. Shakespeare: LA TRAGEDIO DE REĜO LEAR. Trad. K. Kalocsay. Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio 1966. 160 p. (p. 145-149).

Enkonduko. En: RENDSZERES ESZPERANTÓ NYELVTAN (Sistema Gramatiko de Esperanto). Budapest: Tankönyvkiadó V. 1966, 1968. 244 p. (p. 5-8).

La traduktion en Esperanto. (La traduko en Esperanto).
Babel. Berlin-Schöneberg: Langenscheidt KG 1966, p. 1-3.

Iom da komento al "La tro sincera sklavo" de Q. Horatius Flacus.
MK 1966: 15, p. 124-125.

Iom da komento al la komedio de Plautus: "La superglora soldato".
MK 1966:15, p. 154-155.

Postparolo. En: W. Shakespeare: SOMERMEZNOKTA SONĜO. Trad. K. Kalocsay. La Laguna: J. Régulo 1967. 99 p. (p. 81-84).

Iom da komento al "La enamiĝinta ciklopo" de Ovidius Naso.
MK 1969:9, p. 273-274.

Postparolo. En: W. Shakespeare: LA TEMPESTO. Trad. K. Kalocsay. La Laguna: J. Régulo 1970. 120 p. (p. 91-105).

Kion fari por la Esperanta literaturo.
HV 1971:3, p. 6-7; HdE 1971:18 (1517), p. 2. (Fragmento); Boletín 1972:julio-aŭgusto, p. 3-5.

La tri vivoj de Literatura Mondo.
HV 1972:4, p. 4-5.

Egy eszperantó műfordító emlékezései (Rememoroj de Esperanto-tradukisto).
EM 1973:10, p. 23-24.

La Esperanta novelo.
HV 1974:1, p. 5-6.

Antaŭparolo. En: A. Csiszár—K. Kalocsay: DOMFABRIKO. 6000 FRAZEOLOGIAJ ESPRIMOJ HUNGARAJ ESPERANTAJ. Budapest: Hungara Esperanto-Asocio 1975. 188 p. (p. 9-10).

Postparolo. En: H. Ibsen: Brand.Trad. el la norvega de E. A. Haugen. Antverpeno, La Laguna: TK/Stafeto 1978. 320 p. (p. 301-319).

Irodalom és mesterséges nyelvek (Literaturo kaj artefaritaj lingvoj). En: Világirodalmi Lexikon (Mondliteratura Enciklopedio). Budapest: Hungara Scienca Akademio 1978-1979.

9.4 LA SEVERA RECENZANTO

En la verkaro de Kalocsay okupas gravan lokon lia recenzista agado, kies stimula efiko multe kontribuis al la evoluo de la Esperanta kritiko.

En la unua periodo de nia lingvo la kritiko kiel literatura speco estis sensignifa. En la tiutempaj gazetoj apenaŭ troviĝas pretendema recenzo, valorekzamena taksado pri la verkoj. Mankis ne nur kompetentaj kritikantoj, sed ankaŭ la aŭtoroj ne abundis per eminentaj artkreaĵoj. Ĝoja evento estis, se entute aperis ia libro, ĉar ĝi riĉigis la Esperanto-literaturon.

La evoluon de tiu ĉi artospeco multe bremsis la merkata problemo. La konstato de Vilmos Bleier – *ne sufiĉas eldoni librojn, sed oni devas tiujn ankaŭ vendi* – validas ankaŭ hodiaŭ, ĉar la vendado kaŭzas zorgojn al la eldonistoj. La Kaloĉaja difino "Poeto sen popolo" estas disvastigebla al la Esperanta literaturo entute. La senpopola poeto ne unufoje meditis: *kiu estos kaj kiam la unua aŭtoro, kies pandona profesio estos "Esperanto-poeto, verkisto".*

Estas fakto, ke en la libromerkato de Esperantio regas malpli favoraj cirkonstancoj ol en la foiro de nacilingvaj libroj. El tio sekvas, ke la intereso de la eldonisto multe pli deziras, ke la kritiko estu kvazaŭ reklamo kaj per laŭdado de la verko rekomendu la varon al la kliento. Do anstataŭ zorga analizo de la kreaĵo – kiu krom kompetentulo postulas ankaŭ tempon kaj sufiĉan lokon en la gazeto – enhejmiĝis la stereotipa libroprezentado, kiun oni povus nomi "sandviĉ-recenzo", t. e. sur indiferanta grundo apetitveka (aĉetad-instiga) ŝmiraĵo.

Kalocsay taksis la kritikon kiel gravan kontribuon al la sana evoluo de la Esperanto-literaturo, kaj li instigis analizajn taksadojn de la verkoj. En la 16-paĝa *Literatura Mondo* mankis loko por analizo de la pli kaj pli multiĝintaj novaj libroj, tial la *LM-Eldonejo* en 1933 aperigis kvaronjaran kritik-revuon sub titolo *Bibliografia Gazeto*. Baldaŭ ĉi tiu recenzejo montriĝis malvasta kaj la stabo de la revuo eldonis la *Lingvo-Libron*, kiel senpagan suplementon de *Literatura Mondo*, en kiu aperis valoraj studoj pri novaj verkoj. Kompreneble ne temas pri tio, ke la pretendema recenzanto Kalocsay neniam cedis al la devigaj cirkonstancoj. Ankaŭ el lia plumo fontis "sandviĉ-kritikoj", ĉefe kiam la verko mem ne meritis detalan pritrakton.

La egala laŭdado de valoraĵoj kaj rubaĵoj – diris Kalocsay – *estas rekte malutila, ĉar ĝi erarigas la legantan publikon; kuraĝigas la fuŝulojn kaj ĉagrenas la talentulojn, kiuj devas reĝ kaj ree sperti, ke ilia laboro ne estas taksata distinge. Do estas tre vere, ke la kritiko en Esperanto devas esti pli zorgata, ke la gazetoj kaj revuoj devas pli bone elekti siajn recenzantojn, ke la recenzo devas ne esti plu oportuna rimedo ricevi librojn senpage, sed tasko zorga farata kaj responda."*

La unua numero de *Bibliografia Gazeto* skizas kelkajn sekvindajn principojn de la kritiko – prilaborita de Kalocsay kaj Tárkony – plie etikajn ol pure artismajn. Jen fragmentoj el ties ĉefaj punktoj.

La kritikisto rigardu ĉiam la verkon kaj ne la verkiston. Personaĵo de l' aŭtoro estu atentaj nur, se ili nepre necesas por klarigi la verkon. Neglekto de tiu ĉi grava postulo alportas perdon de l' objektiveco, kiun ĉiu kritikisto devas fiksi al si cele, se ili ne volas iĝi simpla reklamisto aŭ pamfletisto. Insisto pli apudaj cirkonstancoj, spertoj akiritaj per persona kontaktiĝo kondukas al la danĝero, ke anstataŭ serioza kritiko oni skribas klaĉaĵon aŭ atakaĉon kontraŭpersonan.

El la postulo de la objektiveco sekvas, ke la kritikisto devas kiel eble pleje sendependigi sin de ĉia influo ekstera, kaj de ĉiuj antaŭjuĝoj kaj baroj internaj. Lia devo estas: konstati kion intencis la aŭtoro kaj kiel li sukcesis realigi sian intencon. Se la tendenco de la verko ne plaĉas al la kritikisto, li povas ĝin ataki, sed nur per argumentoj bone prezentitaj. Neniel en senmotivaj asertoj kaj per falsigo de la senco de l' kritikita teksto, kiel enmodiĝis lastatempe en Esperantujo.

La kritikisto menciu la trovitajn mankojn, sed li gardu sin de la eksluziva sindono al flarado pri ili. Pure negativa kritikado atestas pri malplena, malsana animo. La kritikisto neniam laciĝu en la pliprofundigo kaj plilarĝigo de sia kulturo...

La kritikisto kritiku la verkon, ne la personon de la aŭtoro, sekve ankaŭ en sia stilo li klopodu al objektiva tono. Severe, eĉ senindulge oni povas kritiki per ĝentila voĉo. Kaj se la aŭtoro trovas personan atakon tie, kie ĝi ne estis, se li ofendiĝas, kiam ne estis kaŭzo, la kritikisto bedaŭru la miskomprenon, sed kun pura konscienco li pluiru sian vojon, ĉar li agis en la intereso de nia literaturo

Al la kritikisto Kalocsay multaj riproĉis, ke li observas la Esperanto-verkojn per lupeo. Kelkaj plendantoj argumentis, ke nian literaturon kultivas pleje amatoroj, do oni devus iliajn kreaĵojn juĝi malpli severe, ol la verkojn de la nacilingvaj aŭtoroj.

Kalocsay opiniis, ke la ĉi-rilata "lojaleco" estas peko kontraŭ nia literaturo, ĉar la nenidira kaj flata, nemerita recenzo ne instigas al fortostreĉo, al pli predendema laboro. Paralele kun la riĉigo, maturiĝo de Esperanto, oni povas, eĉ devas postuli ke la stila nivelo altiĝu.

Jes ja. Saltadi (eĉ gracie) povas ankaŭ la kaprido, sed la altosaltisto strebu transsalti la pli kaj pli altigitan laton.

La aŭtoro – diris Kalocsay – *povas eltiri lecionon el la kritiko, kondiĉe ke li ne estas orgojla.*

*

En la praktiko oni spertas, ke la juĝanto kaj la juĝato ne ĉiam konkordas.

Unu el la juĝitaj aŭtoroj – hodiaŭ jam oni povas diri lian nomon: Julio Baghy – foje en poemo pikadis la "reĝon kaj papon de l' Esperanto-poetoj". Kalocsay al la insulto respondis same per poemo:

LETERO AL "LA VAGABONDO"[122]

Kara Baghy, ĵus mi vidis,
ke per via plumo
vi pikadas min en via
nova versvolumo,
en kvardekunua kanto
de la "Vagabondo".
Do, aŭskultu nun,
mi skribas al vi por respondo.

Ankaŭ mi ne "volas esti
de l' poetoj reĝo"
kaj neniam volas sidi
sur la papa seĝo,
nek min kredas senerara
kaj ne kritikebla,
nek ekbolas pro kritiko
en kolero febra.

Ĉar — laŭ mia opinio —
estas la kritiko
tre necesa, tre utila,
kaj ne "lanca piko".

Kiu volas la kritikon
puni per mort-frapo,
kara, ĉu ne volas esti
tiu vere — papo?

Sen kritik' la poezio
certe degeneras,
per ĝi la poeto gajnas,
eĉ se li suferas.
kaj precipe bone faras
se l' kritikon dankas,
tiu beletrist' al kiu
memkritiko mankas.

Poste, kial vi atakas min?
Ja tiun libron
pro kio vi perdis vian
tutan ekvilibron,
kaj pro kiu ĉion sur min
ŝmiras vi riproĉe
verkis ja de paĝ' al paĝo
ne mi mem, sed Totsche.[123]

Aŭ ĉu vere vi atakas
min per la akuzo,
ke mi kaŝis min post Totsche
kun diabla ruzo?
Bone, sed se ĉi akuzon
vi jam elrezonis
diru do, ĉi tiun ruzon
kial mi bezonis?

Ĉu mi estus tiel ege
malkuraĝa homo,
ke mi timus pri vi skribi
sub la propra nomo?
Ne! Mi pruvos! Ĉar senĉese
vi min provokadas,
mi eldiros ĉion, kio
min jam sufokadas.

Diros mi, ke la atakoj
nun de via flanko
estas nelojalaj, montras
ege pri sendanko.
Kaj per "batal' principa"
vi ja vane vestas
la malamon, kiu sub ĝi
tro videbla estas.

Kio estas la motivoj
de l' malam' kolera?
Nu, ĉi tio longe estis
al mi tre mistera.
Sed mi nun jam klare vidas:
kiel ajn absurdas,
vi ne povas min pardoni,
ke vi al mi — ŝuldas.

Mi ĉe via skrib' unua
devis tuj rimarki,
ke ĝarden' vi estas,
kiun oni devas sarki.
Do mi sarkis diligente
kaj kun multa peno,
kaj konfesu, ke per tio
gajnis la ĝardeno.

Kiom ofte mi korektis
viajn stilajn stumblojn,
vi per tio gajnis laŭrojn,
kaj mi — viajn grumblojn.

Ĉar vin "fiereco" gvidis,
kaj obstina vanto,
min — ke plej perfektan verkon
havu — Esperanto.

Art' por arto, bel' por belo,
jen kio min gvidis,
dum mi apud viaj verkoj
cerbumante sidis.
Kaj nun diru do en prozo,
diru do en rimoj,
ĉu pro tio viaj verkoj
iĝis do — viktimoj?

Nur mi iĝis la viktimo,
mi malŝparis penon,
vi — profitis, kaj eksentis
al mi abomenon.
Do — mi fine vin rezignis,
Ĉesis prem' terura,
kaj vi ĵetis vin ekspire
en liberon — hura!

Longe ĝuis vi plezure
tion liberigon,
kaj ĵaluze gardis vian
gloron kaj prestiĝon.
Sed ho ve, subite venis
kritikista plumo,
montris ankaŭ pri l' makuloj,
ne nur pri la lumo.

Kaj vi tiam tuj resentis
al mi la malamon,
memorante, ke mi iam
diris preskaŭ samon,
kvankam ties solvo estas,
ke li simple — pravas.
Samon dirus ĉiu, kiu
bonan guston havas.

Estas vere, ke ne povis
vin ĝisfine laŭdi,
sed, ĉu la sincerajn vortojn
vi ne povas aŭdi?
Blufa pozo — vi kondamnas
kun anim' barakta,
sed — ja ĉiun riproĉeton
sekvas cito fakta!

Sed mi vane parolaĉas
Per predik' senfina,
vi ja mem vin diras homo
spita kaj obstina.
Rajdu do Pegazon propran
flugu ĝis la astroj
kaj Ĝin, se aveno mankas,
nutru per bombastoj.

K. Kalocsay
(1933)

*

Kalocsay juĝis severe kaj objektive ankaŭ la proprajn verkojn, kaj li akceptis la bonintencan admonon sen ofendiĝo. Foje J. V. Dolinský trarigardis tutan jarkolekton de *Hungara Vivo* kaj listigis la trovitajn erarojn lingvajn, ortografiajn kaj vortarajn. Kalocsay zorge studis la liston kaj konstatis, ke multaj el la rimarkoj de Dolinský pravas. Li, la lingva revizoro de la revuo ne ofendiĝis, faris detalajn notojn al la rimarkoj kaj proponis al la redaktoro:



Mi kredas, ke oni devas danki al la kritikanto
kaj skribi, ke ankaŭ alifoje ni ĝoje akceptos
de li kritikon.

K. Kalocsay

*

Konvene al la signifa rolo de la kritiko, Kalocsay ĉiam konscience verkis la recenzojn. Foliumante la revuojn, oni devas konstati, ke kelkaj el ili – ekz. *Natan, la saĝulo; Esperanto 60-jara; Kompleta Lernolibro de Regula Esperanto; Fremdvortoj en Esperanto; La nova Plena Vortaro; Kalevala; Angla Antologio;* ktp. – estas tiom artaj studoj, ke ili eĉ hodiaŭ povas servi kiel modeloj de tiu ĉi grava literatura artospeco.

122 Dum la poemkovo kvietiĝis la kolero de Kalocsay kaj ĉi tiun indignan versajojn li ne sendis al la adresito. Li ne volis akrigi la tiutempan situacion estiĝintan pro neologismoj. La poemo aperis unuafoje en la volumo: VERSOJN ONI NE AĈETAS (1992).

123 Temas pri la libro de L. Totsche: DE PAĜO AL PAĜO. (1932).

9.4.1 RECENZOJ DE KALOCSAY

Poezio de Stanislav Schulhof.
LM 1922/39. Kopar.

Krioj de l' koro. Poemoj de Salo Grenkamp-Kornfeld.
LM 1922/39-40. Kopar.

Stamatov: **Nuntempaj rakontoj.** El la bulgara lingvo tradukis I. H. Krestanoff.
LM 1923/60. Kopar.

Eugen Wüster: **La oficiala radikaro.** Kun enkondukoj kaj notoj.
LM 1923/118-119. Kopar.

Historio de Esperanto. K. Brüggemann.
LM 1923/119. Kopar.

Das Deutsche Lied in Esperanto. Germanaj kantoj esperantigitaj. Komp. Friedrich Pillath.
LM 1923/119. Kopar.

Natan la Saĝulo. Drameca poemo de G. E. Lessing. El la germana: Karl Minor.
LM 1923/158-159. Kopar.

Eugen Wüster: **Enciklopedia Vortaro Esperanta-Germana.**
LM 1923/184. Kopar.

Wilhelm Hauff: **La almozulino de la "Pont Des Arts".** El la germana: K. Brüggemann.
LM 1923/207. Kopar.

Heinrich Zschoke: **Aventuro en la novjara nokto.** Traduko de H. Zschoke.
LM 1923/207. Kopar.

K. Brüggemann: **El la mitologio de la antikvaj popoloj.**
LM 1923/207-208. Kopar.

La Struvelpetro. Beletaj rakontoj kaj komikaj bildoj de dro Heinrich Hoffmann. Esperanta traduko de J. D. Applebaum.
LM 1923/208. Kopar.

P. Bennemann: **Esperanto Hand-Vörterbuch.** I. Teil. Esperanto-Deutsch.
LM 1923/208. Kopar.

Friedebert Tuglas: **En la fino de la mondo.** El la estona lingvo trad. Henriko Seppik.
LM 1924/76. Kopar.

Eugen Wüster: **Die Verhaltniswörter des Esperanto.**
LM 1924/104. Kopar.

Jaume Grau Casas: **Amaj poemoj**.
LM 1924/104. Kopar.

H. J. Bulthuis: **Idoj de Orfeo.** Originala romano.
LM 1924/123-124. Kopar.

Friedebert Tuglas: **Popi kaj Huhuu.** Novelo. El la estona: Henriko Seppik.
LM 1924/180. Kopar.

Friedebert Tuglas: **Kvin noveloj.** El la estona: Henriko Seppik.
LM 1924/180. Kopar.

Jean Forge: **Saltego trans jarmiloj.** Romano originale verkita.
LM 1924/200. Kopar.

Waldemar Bonsels: **Solandro.** Tradukis Edmund Sós.
LM 1925/16. Kopar.

W. Shakespeare: **La tragedio de Reĝo Lear.** El la angla: A. L. Curry kaj A. J. Ashley.
LM 1925/28. Kopar.

Karl Minor: **Esperanto-Deutsches Handwörterbuch.**
LM 1925/junio, posta interna kovrilpaĝo. Kopar.

La urbestro de Zalamea. Dramo en tri aktoj. El la hispana originalo: Enrique Legrand.
LM 1925/oktobro, posta interna kovrilpaĝo. Vince.

ADA (A. Atanasov): **Rememoroj de esperantisto.**
LM 1925/oktobro, posta interna kovrilpaĝo. Vince.

Stanislaw Balinski: **La lasta kravato de Aleksy.** El la pola originalo: Stanislaw Karolczik.
LM 1925/oktobro, posta interna kovrilpaĝo. Vince.

Arturo Ghez: **Vi sola, Esperanto, povas fari tiajn miraklojn.**
LM 1925/oktobro, posta interna kovrilpaĝo. Vince.

Miĥaelo Babits: **Cikoni-Kalifo.** Romano. El la hungara tradukis Karlo Bodó.
HH 1929:6, B eldono, p. 8. Kopar.

Eugen Wüster: **Enciklopedia Vortaro.** Esperanta-Germana, IV. parto.
LM 1931/15-16. Kopar.

L. L. Zamenhof: **Originala Verkaro.** Antaŭparoloj, gazetartikoloj, traktaĵoj, paroladoj, leteroj, poemoj. Kolektitaj kaj ordigitaj dro Joh. Dietterle.
LM 1931/16. Kopar.

Plena Vortaro de Esperanto. Verkita de Prof. E. Grosjean-Maupin.
LM 1931/49-50. Kopar.

Salom Alejhem: **Ĉe doktoro.** Monologo. El la hebrea lingvo: Josef Rabinovic-Tajc.
LM 1931/181. kr.

Krista Ludw: **Pri la prononcado en Esperanto.**
LM 1931/200. Kopar.

E. Wüster: **Internationele Sprachnormung der Technik.**
LM 1931/232-233.

E. Drezen: **Skizoj pri teorio de Esperanto.** Libro dulingva (Esperanta kaj rusa).
LM 1932/111. Kopar.

Prof. Dro Göhl: **Ausfürliche Sprechlehre des Esperanto.**
LM 1932/159. Kopar.

La kreitaj profitoj. Pulĉinela komedio en du aktoj de Jacinto Benevante. Tradukis el la hispana Vincente Inglada.
BG 1933:1, p. 6-8. Kopar.

Ivan Mazuraniĉ: **La morto de Smail-Aga Ĉengiĉ.** Heroa eposo kroata. Traduko kaj klarigoj de Mavro Ŝpicer.
BG 1933:2, p. 25-27. Kopar.

Carlo Goldoni: **Kurioza okazaĵo.** Triakta komedio. El la itala tradukis: Mevo.
BG 1933:3, p. 45-46. Kopar.

Paul Neergaard: **Fremdvortoj en Esperanto.**
BG 1933:3, p. 47-49.

Moderna Esperanto-Japana Vortaro. Kompilis Yoshi H. Ishiguro.
BG 1933:3, p. 50. Kr.

F. Azorin: **Universala Terminologio de la Arkitekturo.**
LL 1934:1, p. 12-13. (y)

W. G. van de Holst: **Jaĉjo Holm kaj liaj amikoj.** Romano, tradukita el la nederlanda originalo de H. C. van Leeuwen.
LL 1934:1, p.13-14. (y)

Moliére: **La Mizantropo.** Komedio en kvin aktoj. El la franca lingvo tradukis Prof. H. Boucon.
LL 1934:1, 14. (y)

The Tenh Book Of Hommer's Odysswy. Trad. Giles Dixey.
LL 1934:1, p.15. (y)

Fusao Hajasi: **Bildlibro sen bildoj.**
LL 1934:2, p. 26. (xy)

La Profeto. Paĝoj el la hungara laboristtendenca belliteraturo. Redaktis kaj antaŭparolis. I. Baranyai.
LL 1934:2, p. 26. (xy)

Dro S. Chazan: **Socialismo.** Ĝia ideologio kaj religio.
LL 1934:2, p. 26. (xy)

Japanaj fabeloj. Trad. anoj de J. E. S.
LL 1934:2, p. 29. (xy)

Iŝiguro: **Praktika Gvido de korespondo en Esperanto.**
LL 1934:2, p. 29. (y)

Ivans: **La viro el Francujo.** Aventuro de Geoffrey Gill, detektivo. El la nederlanda lingvo tradukis W. Versteeg Graftdijk.
LL 1934:3, p. 41-43. (y).

Verkoj de Dro Nakamura.
LL 1934:3, p. 45-46. (xy)

La nova **Plena Vortaro.**
LL 1934:4, 49-50. -y

Upton Sinclair: **Jimmie Higgins.** Tradukis el la angla: Karl Fröding.
LL 1934:4, p. 57-58. V. K.

Norda Literaturo. Kolekto de literaturaj verkoj el Norda Eŭropo.
LL 1934:4, p. 58. V. K.

William George Adams: **Piramo kaj Tizbeo.** Burleska tragedio verkita en E-aj versoj.
LL 1934:4, p. 61. (xy)

Sexton Blake: **La nigra kato; Moderna alĥemiisto.** Du detektiv-noveloj. Tradukita kaj komentariita de H. Haĵi.
LL 1934:4, p. 61. (xy)

Julie Supichová: **Esperanto-Lernolibro por ĉeĥoj.**
LL 1934:4, p. 61. K.

Amelia kaj Marina. Amatora poezio: J. Mangada Rosenörn.
LL 1935: 1, p. 48. -y

E. Phillips Oppenheim: **La ora ŝtuparo.** Tradukis Esperantista Societo de Romford.
LL 1935:4, p. 57. Alex Kay.

Du noveloj (de Jiri Sumín kaj Ruzena Svobodová). Tradukis M. Jandlová, T. Mrázková, M. Ziková.
LL 1936:2, p. 16-17. A. K.

Facilaj Esperantaj Legaĵoj. Kompilitaj de Prof. G. Waringhien.
LL 1936:2, p. 18. A. K.

Ĉu mi dormas libera de sandetruaj terradioj? El la nederlanda: M. E. Giltay.
LL 1936:2, p. 19-20. A. K.

M. Rollet de L'Isle: **Malsimplaj Formoj de la Verbo.**
LL 1936:3, p. 17-18.

M. Rollet de L'Isle: **Skribado kaj Prononcado de la Personaj kaj Lokaj Nomoj.**
LL 1936:3, p. 18.

M. Rollet de L'Isle: **Farado kaj Analizo de la Malsimplaj Vortoj.**
LL 1937:2, p. 13.

100 Pikantaj panŝmirajoj. Kolektitaj de Dro M. Topolansky. Kompletigitaj de F. Ruhm. Tradukis el la germana Dro H. Sirk.
LL 1937: 3-4, p. 21. A. K.

Tage Lindbom: **Sveda laborista movado.** Tradukis: Martin Johansson.
LM 1948/32. A. K.

G. J. Degenkamp: **Esperanto 60-jara.**
LM 1948/63-64.

Leteroj de Zamenhof. Prezentado kaj komentado de Prof. G. Waringhien.
LM 1949/96.

Angla Antologio. Redaktoroj: William Auld kaj Reto Rossetti.
Esperanto 1958/81-83.

Baldur Ragnarsson: **Ŝtupoj sen nomo.** Poemaro. En la Antaŭparolo de J. Régulo, kritiko de Kalocsay skribita en letero. Stafeto. La Laguna. 1959.

Ossaka kenji: **Malgranda monografo pri la Esperantaj prepozicioj; 505 Elektitaj poemoj el Mannjoo-ŝuu.**
NLR 5. 1960:27, p. 100-104.

Kalevala. Popola eposo. El la finna tradukis J. E. Leppäkoski.
Esperanto 1968/110-111.

Perfektiga kurso: Plena traktato pri la sintakso de Daniel Quarello.
Esperanto 1971/88.

Libro de apokrifoj de Karel Ĉapek. Trad. Josef Vondroušek.
Esperanto 1971/185.

Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto. Ĉefredaktoro kaj antaŭparolanto estas Prof. Gaston Waringhien.
HV 1971:2, p. 26.

Ivan Mazuranić: **La morto de Smail-agao Ĉengić.** Trad. el la kroata Josip Velebit.
HV 1973:2, p. 27.

Az Eszperantó Értelmező Szótára (pri la **Plena Ilustrita Vortaro).**
EM 1974:1, p. 14.

L. Mimo: **Kompleta Lernolibro de Regula Esperanto.**
HV 1974:5, p. 29; daŭrigo 1975:1, p. 18

Lingvo kaj logiko. (Al la recenzo de Kalocsay pri la **Kompleta Lernolibro**... L. Mimo la aŭtoro reagis per du longaj leteroj). Kalocsay klarigas la insiste ripetitajn erarajn tezojn de Mimo.
HV 1975:3, p. 30; <repr. en FE 1976, aprilo-majo, (298), p. 38-39>; 1976:1, p. 19.

La Participa demando en la Akademio.
Dokumentaro kompilita kaj kunmetita de E. Vilborg (1973).
HV 1975:2, p. 26.

Gaston Waringhien: **"Ni kaj Gi".** Eseoj III. Pri religio kaj arto.
HV 1975:4, p. 28-29; repr. 1977:4, p. 28-29.

* * *

9.5 PORTRETOJ VERKITAJ DE KALOCSAY[124]

Ady, Endre (1877-1919). Hungara poeto.
HV 1963:2, p. 5-6; 1977:4. p. 5-6; repr. en: MDĈ p. 5-8.

Alighieri, Dante (1265-1321).
En la Antaŭparolo de la INFERO p. 5-8. Vd en la 3-a volumo p. 60-62.

Arany, János (1817-1882). Hungara poeto.
HV 1963:1, p. 3-5. K. K.

Archilochos. Antikva greka poeto en la VII-a jc.
NP 1956:2, p. 54-55.

Auld, William (1924).
VL p. A.

Babits, Mihály (1887-1941). Hungara poeto, verkisto.
LM 1924/54-55. Kr.; HV 1964:3, p. 3-4. K. K.

Baghy, Gyula (Paĉjo) (1891-1967).
VL p. B.

Balkányi, Pál (1894-1977).
HV 1964:1, p. 15-16.

Baudelaire, Charles (1766-1834). Franca poeto.
En la Enkonduko de LA FLOROJ DE L' MALBONO. Kun G. Waringhien. Vd en la 3-a volumo p. 66-67.

Behring, Emil (1854-1917). Germana bakteorologo.
Savinto de junaj vivoj.
Népszava (Popolvoĉo) 1954.03.16.

Bein, Kazimierz (ps.: Kabe) (1872-1959).
Kabe centjara.
Esperanto 1972/103.

Belmont, Leo (ps. de Blumenthal, Leopold). (1865-1941).
Leo Belmont, la gaja profeto. (Poet-portreto).
NP 1960:4, p. 110-112; daŭrigo 1960:5-6, p. 160-163.

Bicknell, Clarence (1842-1918).
(Poet-portreto).
NP 1966:3, p. 168-171.

Bleier, Vilmos (1903-1940).
HV 1968:4, p.1-3; repr. en: BI 1978:5, p. 4

Bodó, Károly (1903-1963).
(Nekrologo).
HV 1963:2, p. 15.

Boulton, Marjorie (1924).
VL p. B.

Braun, Stanislaw (1893-1956).
Stanislaw Braun, la droninta poeto.
(Poet-portreto).
NP 1959:2, p. 76-78.

Bulthuis, Jan Hindrik (1865-1941).
VL p. B.

Dresen, Hilda (1896-1981).
VL p. D.

Emba (ps. de Baranyai, Imre) (1902-1961).
(Nekrologo).
HV 1962:2, p. 5-6. K. K.

Eroŝenko, Vasilij (1890-1952).
Eroŝenko, la blinda mondmigrulo.
(Prelego en la Grupo Konkordo, Budapest, 1963).
Presite en: DPr p.71-77; repr. HV 1984:4, p. 146-148.

Fáy, Dezső (1888- ?) Hungara pentristo.
En: INFERO de Dante p. 283-284. Vd en la 3-a volumo p. 60-62.

Giesswein, Aleksandro (1856-1923).
(Nekrologo).
LM 1923/209. Anonime.

Grabowski, Antoni (1856-1921).
EdE p.198-200; VL p. G.

Grau Casas, Jaume (18961950).
VL p. G.

Grosjean Maupin, Emile (1863-1933).
(Nekrologo).
LM 1934/10. (y).

Hankel, Marie (1844-1929).
Variantoj pri la temaro de Marie Hankel.
(Poet-portreto).
NP 1958:4, p. 213-217.

Heine, Heinrich (1797-1856).
En la Antaŭparolo de KANTOJ KAJ ROMANCOJ p. 9-23. Kun G. Waringhien. Vd en la 3-a volumo p. 75-76.

I. U. (ps. de Ito saburo) (1902-1969).
La poem-malŝata poeto.
(Poet-portreto).
NP 1960:3, p. 81-85; tradukita al la japana lingvo, kaj aperigita en aparta broŝuro.

Janus Pannonius (ps. de Csezmicei, János). (1434-1472). Hungara poeto, verkis latine.
HV 1962:3, p. 5-6. K. K.; 1972:3, p. 5.

József, Attila (1905-1937). Hungara poeto.
HV 1961:3-4, p. 9-10. K. K.

Juhász, Gyula (1883-1937). Hungara poeto.
HV 1963:4, p. 3.

Karinthy, Frigyes (1887-1938). Hungara verkisto, poeto.
En: Enkonduko de MORGAŬ MATENE. p. 3-4. Vd p. 47-48.

Kassák, Lajos (1887-1967). Hungara poeto, verkisto.
HV 1965:4, p. 20. K. K.

Kazinczy, Ferenc (1759-1831). Hungara poeto, lingvo-noviganto.
HV 1963:3, p. 29-31, daŭrigo 1963:4, p. 18-19.

Kökény, Lajos (1897-1985).
(Intervjuo).
HV 1970:1, p. 18. K. K.

Komját, Aladár (1891-1937). Hungara poeto.
HV 1961:1, p. 5-6.

Kosztolányi, Dezső (1885-1936). Hungara poeto, verkisto.
HV 1966:1, p. 17. K. K.

Kozlowski, Czeslaw (1894-1956).
Revivigo de Czeslaw Kozlowski.
(Poet-portreto).
NP 1959:3, p. 120-125.

Madách, Imre (1823-1864). Hungara dramverkisto.
"La Tragedio de l' Homo kaj Imre Madách".
(Prelego en la Grupo Konkordo, Budapest 1964).
Presita en: DPr p. 107-110.
Imre Madách.
HV 1964:2, p. 9-11.

Petőfi, Sándor (1823-1849). Hungara poeto.
LM 1922/42. Anonime; HV 1961:1, p. 3-4. K. K.; HE 1969:9, p. 4; en: Enkonduko de LIBERO kaj AMO p. 5-17. Vd en la 3-a volumo p. 52-54.

Pumpr, Tomas (1906-1972).
(Nekrologo).
HV 1973:1, p. 24.

Puŝkin, Aleksandr Sergejeviĉ (1799-1837). Rusa poeto.
LM 1949/89-91. K. Stelov.

Radnóti, Miklós (1909-1944). Hungara poeto.
HV 1965:1, p. 4-5. K. K.

Schoor, Jan van (1896-1955).
Jan van Schoor, la grandurba paŝtisto.
(Poet-portreto).
NP 1955:5, p. 211-214.

Schwartz, Raymond (1894-1973).
EdE p. 483.

Shakespeare, William (1564-1616). Angla dramverkisto kaj poeto.
(Poet-portreto).
Postparoloj en: LA REĜO LEAR; SOMERMEZNOKTA SONĜO; LA TEMPESTO.
Vd en la 3-a volumo p. 69, 72, 78.

Reĝo Stefano (? -1038). Fondinto de la hungara ŝtato
HV 1970:4, p. 1. K. K.

Szathmári, Sándor (1897-1974).
HV 1968:1, p. 15. K. K.

Szilágyi, Ferenc (1895-1967).
HV 1965:3, p. 14.
La ĉiomflankulo.
HV 1975:5, p. 11.

Tárkony/Totsche, Lajos (ps.: Lali Blond). (1902-1978).
HV 1962:4, p. 6-7; en: Antaŭparolo de SOIFO. La Laguna: J. Régulo, 1964. 231 p. (p.9-14).

Tóth, Árpád (1866-1928). Hungara poeto.
HV 1963:3, p. 3. K. K.

Vörösmarty, Mihály (1800-1855). Hungara poeto.
HV 1964:4, p. 3-4. K. K.

Zamenhof, Ludoviko Lazaro (1859-1917).
Zamenhofa tago 1962.
(Prelego en la Grupo Konkordo. Budapest, 1962).
HFM 1967:4, p. 48-50; en: DPr p. 111-116.

124 Ĉi tiu listo ne enhavas skizajn biografiajn notojn troviĝantajn en ETERNA BUKEDO, DEKDU POETOJ, NAŬ POETOJ, GVIDLIBRO II, TUTMONDA SONORO kaj HUNGARA ANTOLOGIO.

9.6 ESEOJ KAJ ARTIKOLOJ PRI LA ESPERANTA POEZIO

Asonanco.
LM 1922/20. K. de K.

Ritmo (Diskuto).
La kompatinda poeto.
Al la letero de Namil Lab[125] (LM 1922/40), respondo:
LM 1923/60. Kopar.

J. G. C. Diskuto (pri ritmo).
LM 1925/februaro, posta interna kovrilpaĝo.

La Esperanta poezio.
Prezidanta festparolo en la XI-a IFL (1925. 05. 23. Palme de Malorca)[126]
Presita en: KE 1925:12-13-14, p. 184-189; repr. en: DPr p. 79-85.

La Esperanta rimo.
LM 1931/42-46, 63-65, 110-112; repr. en: LSF p.106-131; KIEL VERKI kaj TRADUKI POEMOJN. Budapest: Hungara Esperanto-Asocio 1979. 26 p. (p. 1-19).

Pri la Esperanta ritmo.
En: LSF p. 138-146; repr. en: KIEL VERKI... p. 20-26.

Klasika metriko en Esperanto.
En: LSF p. 147-153.

Kelkaj rimarkoj. (Pri ritmo kaj rimoj).
En: EB p. 327-333; repr. en: TS p. 563-567.

La arto de la verstraduko en Esperanto.
Prelego dum la 32-a UK (Bern, 1947) aranĝita preleg-vespero de Esperanto-verkistoj.
Presita en: DPr p. 39-54.

Pri la poetiko de "Malnovaj lampoj".
Diskuto kun Brendon Clark.
LM 1948/180-181.

La klasika metriko kaj Esperanto.
NLR 5. 1959:5, (23), p. 164-171, daŭrigo 5. 1959:6, (24), p. 208-219, 5. 1959:25, p. 5-17, 5. 1959:26, p. 48-57; repr. en: TS p. 568-595.

Pri la tradukoj de la poemo de Gyula Juhász.
Diskuto kun K. Papp pri la tradukoj de *Kia estis...*
HE 1969:6, p. 2-3.

La "Vesperkanto" de Goethe.
Pritrakto de la nefacile tradukeblan kanton de Goethe: *Wanderns Nachtlied.*
Oomoto 1970: julio-aŭgusto, p. 108-109.

Iom da babilo pri poemtraduko.
HE 1971:6, p. 6-8, 1971:7, p. 9-10, 1971:8, p. 2-4, 1971:9, p.3-5, 1971:10, p. 3-5.

La aliteracio.
Verkita por la nova eldono de "Enciklopedio de Esperanto".
Esperanto 1974/14.

La "Okcidento" de Tárkony.
Komento de la odo en la poemvolumo SOIFO (1964).
HV 1975:6, p. 4-5.

125 Plumnomo de Jean Balliman.
126 Kalocsay ne ĉeestis. Lian paroladon voĉlegis D. Dalmau kaj katalune klarigis kelkajn fragmentojn por la multaj neesperantistoj, kiuj ĉeestis la Feston.

9.7 LA OBSERVANTO

Kalocsay en la dua numero de *Literatura Mondo* (1922) iniciatis novan rubrikon sub titolo *Mondliteratura Observo*. Ĝi celis informi la legantojn pri artaj eventoj kaj literaturoj nacilingvaj. La redaktoroj esperis, ke la rubriko povos fariĝi fidela spegulo de la tutmonda literaturo kaj alvokas la atenton de la neesperanta mondo. La rubriko baldaŭ fariĝis populara legaĵo de la esperantistoj, sed la deziritaj "eksteraj interesiĝantoj, novaj abonantoj" ne anoncis sin.

La stabo klopodis scigi pri la plej freŝaj kulturaj eventoj, sed ĝenerale ne estis realigeble, ke pri la novaĵoj venu raporto rekte el la loko de la evento.

Kion fari? La problemon necesis solvi per redaktora artifiko. Tiel okazis, ke foje aperis raporto pri grandsukcesa teatraĵo surscenigita en Florenco, kiun la raportisto ne vidis. Tamen la sciigo pri la ludo de la ĉefaktorino Eleonore Duse estis tiel vivo-plena, ke la legantoj eĉ ne konjektis, ke ĝin fabrikis Kalocsay en Budapeŝto. Verŝajne li ĉerpis informojn el hungaraj gazetoj. La subskribita litersigno ne konfesis pri la aŭtoro.

Ĉi tiu rubriko en ĉiuj tri periodoj de *Literatura Mondo* vigligis la paĝojn de la revuo. Ne unu el ili reprezentas literaturan valoron.

9.7.1 OBSERV-ARTIKOLOJ

Eleonora Duse. Pri la dramo de T. Gallarati-Scotti: COSI SIA (Tiel estu), kiun la verkisto kreis por Duse.
LM 1923/117-118. lc.

Roso di San Secondo. Pri la teatraĵo: LA PASIOJ DE L' PUPHOMOJ.
LM 1923/138-139. lc.

Alphonse De Chateaubriant: LA BRIERE. Romano.
LM 1924/55. lc.

Nova teatraĵo de Jean Sarment: FACILITÉ.
LM 1924/75. lc.

Carl Spitteler.
LM 1925/15-16. lc.

Grazia Deledda. Pri la ĵus aperinta romano: DANCO POR LA KOLIERO
LM 1925/51-52. lc.

Reĝo el aero. Pri la legendo de reĝo Arturo.
LM 1925/76. lc.

Cervantes de Bruno Frank. Historia romano.
LM 1935/32. (V.)

Pri duo de Colette. Dramo.
LM 1935/32. (V.)

Pri la "LES DÉSENCHANTÉES" (La elreviĝintinoj) **de Pierre Lotti.**
LM 1935/32-33. (V.)

Pri la vivo de Firdusi.
LM 1935/33-34. (V.)

Postmortaj verkoj de Nietzsche.
LM 1935/34-35. (V.)

S-ino Pope-Hennessy: EDGAR ALLAN POE.
LM 1935/35. (V.)

Hans Fallada: VIR HATTEN MAL EIN KIND (Ni foje havis infanon).
LM 1935/35. (V.)

Virginia Woolf: VIVO DE FLUSH.
LM 1935/35-36. (V.)

Giovanni Papini, Polemikisto.
LM 1935/70. (V.)

Sara Alelia de Hildur Dixelius.
LM 1935/70-71. (V.)

Maurice Rostand: LA PROCESO DE OSCAR WILDE.
LM 1935/71. (V.)

Erasmus. Laŭ Stefan Zweig. Studo.
LM 1935/71-72. (V.)

Claude Farrére kaj Paul Claudel.
LM 1935/72. (V.)

Literaturaj festoj pri granda humanisto de la 12-a jarcento. Pri la okcentjara datreveno de Maimonido.
LM 1935/72. (V.)

L. Milosz: MIGUEL MANARA.
LM 1935/85-86. (V.)

Edouard Bourdet: LA PRISONNIERE.
LM 1935/86. (V.)

Marcel Brion: FOLIE CELADON.
LM 1935/86-87. (V.)

La Creature. Tri aktoj de Ferdinand Bruckner.
LM 1935/87. (V.)

Nova libro pri Shakespeare.
LM 1935/87-88.

G. Kerschensteiner. Granda aganto en la pedagogia revolucio.
LM 1935/88. (V.)

Ugo Foscolo en la franca lingvo.
LM 1935/88. (V.)

Georges Blond: L' AMOUR N'EST QU'UN PLAISIR (La amo estas nur plezuro).
LM 1935/104. (V.)

Boccaccio. Pri la virina beleco.
LM 1935/118. (V.)

Momentoj kun Pirandello.
LM 1935/118. (V.)

Nuntempa itala poezio.
LM 1935/118-119. (V.)

Mozaikeroj pri Aldo Palazzeschi. Poeto, fabelisto kaj romanverkisto.
LM 1935/119-120. (V.)

Revivigo de la franca-itala amikeco.
LM 1935/120. (V.)

La Dame de Malacca (La sinjorino de Malacca) **de Francis de Croisset.**
LM 1935/214. (V.)

Henri Barbusse.
LM 1935/214. (V.)

La derniere chance (La lasta sanco) **de Francis Carco.**
LM 1935/214-215. (V.).

Jean Giraudoux: LA GUERE DE TROIE N'AURA PAS LIEU (La Troja Milito ne okazos). Duaktaĵo.
LM 136/85-86. (V.)

Sortons Hugo de la cave! (Ni eltiru Hugon el la kelo).
LM 1936/86. (V.)

Caradoc Evans. La satiristo de la propra lando.
LM 1936/88. (V.)

Un home comme les autres (Viro kiel la aliaj). Teatraĵo de Armand Salacrou.
LM 1937/26-27. (V.)

La perplekso de Gide.
LM 1937/27. (V.)

Jolanta Földes: LA STRATO DE L' FIŜANTA KATO. Premio por la romano.
LM 1937/27-28. (V.)

Dudek jaroj post la morto de Verhaeren.
LM 1937/27-28. (V.)

S. Vestdijk: ELSE BÖHLER, DUITSCH DIENSTMEISJE (Elsa Böhler, germana servistino). Romano.
LM 1937/29. (V.)

Numantio de Cervantes. Dramo.
LM 1937/60-61.

Modernaj anglaj teatraĵoj.
LM 1937.61-62. (V.)

Historio kaj tekniko de la detektiv-romano de Francois Fosca.
LM 1937/62. (V.)

La centjara datreveno de Swinburne.
LM 1937/62. (V.)

The Ghst Goes West (Vendota fantomo). Filmo de René Clair.
LM 1937/62-63. (V.)

The Green Pastures (La verdaj paŝtejoj).
LM 1937/63. (V.)

G. H. Wells: THE MAN WHO COULD WORK MIRACLES (La viro, kiu povis fari miraklojn).
LM 1937/63-64. (V.)

L' Homme qui se donnait la Comedie (La viro, kiu ludis al si komedion).
LM 1937/191. (V.)

La medicino ĉe la teatro de Shakespeare ĝis Brieux.
LM 1937/191-192. (V.)

De ridsufokiĝo ĝis larmotorento.
LM 1937/192. (V.)

Funebra kermeso. Filmo.
LM 1937/192. (V.)

La rusa demando. Dramo de Konstantin Simonov.
LM 1947/63-64. K. Stelov.

Sartre: LA VENKINTOJ. Teatraĵo.
LM 1947/124-127. Alex Kay.

Kion deziras la infanoj
LM 1948/94-95. K. Stelov.

Amber: "FOREVER AMBER". Romano de Kathleen Winsor.
LM 1948/126-128. (i. k.)

Gide kaj la imperialismo.
LM 1948/158-160. K. St.

Uzbeka filmo pri poeto Navoj.
LM 1948/189-190. K. St.

La "Feliĉo" de Pavlenko.
LM 1948/190-191. K. St.

La jubileo de Puŝkin.
LM 1949/89-91. K. Stelov.

La juna gvardio. Filmo farita laŭ la fama romano de Fadjejev.
LM 1949/94. K. Stelov.

Moskva karaktero. Teatraĵo de Sofronov.
LM 1949/126-127. K. St.

9.8 ARTIKOLOJ PRI DIVERSAJ TEMOJ

Népünnepély, martyrum, vizio (Popolfesto, martireco, vizio).
Szinpad és kultura (Scenejo kaj kulturo) 1919:13, p. 4.

Oni atakas la Akademion.
LL 1935:1, p. 47-48. M. Alice Pik.

Diskreta demando.
LL 1935:4, p. 56. M. Alice Pik.

Verda Stelo kaj verda ŝtelo.
LL 1936:1, p. 7. M. Alice Pik

Tono. Ni estu ĝentilaj. Pri la ofendaj esprimoj de s-ro Grenkamp en *Nia Gazeto.*
LL 1936:2, p. 16. M. Alice Pik.

Defendo de Grenkamp.
Vipo 1937:1, p. 10-12.

Esploro pri kapableco. Respondo al Nekom Petent pri la kandidatoj de *Lingva Komitato.*
LL 1937:2, p. 13. M. Alice Pik.

La kvindek jaroj de la lingvo.
OL p. 176-186.

Mozaiko en la **Paĝoj de profetaĵo.** Pri la venko de Esperanto.
OL p. 210; repr. en: HFM 1984:4, p. 63.

Kion donis la hungaroj al la homaro? Prelego en Esperanta dissendo de la Hungara Radio la 26-an de februaro 1939. Presita en: DPr p. 87-93; repr. en: HFM 1987:1, p. 15-17.

La hungara kultura revolucio. Prelego en la *Somera Esperanto Universitato* en Gyula (Hungario) 1965.
Presita en: DPr p, 95-105.

Esperanto kongresszus Budapesten (Esperanto-Kongreso en Budapeŝto). Pri la 51-a UK.
Budapest 1966:8, p. 39-40.

Ĉapitroj pri Lenin. Teatra kroniko.
HV 1970:3, p. 20. A. K.

Nur por virinoj. Antikomentoj al proverboj ne flataj por virinoj.
HV 1970):1, p. 20. Phil O' Gyn.

"Flugu, Pavo". Konkurso en la hungara televizio pri prezento de popolkantoj.
HV 1970:3, p. 20.

Kalevala. Teatra kroniko.
HV 1970:3, p. 20.

Perdita Paradizo; Reĝo Edipo. Teatra kroniko.
HV 1970:4, p. 25. (KVK).

Mia amo Elektra; La puruloj; El la Libro de Juĝistoj; Roma rabado; Taŭro-priploro. Teatra kroniko el Budapeŝto.
HV 1971:1, p. 28. KVK.

La granda maleblo; La muta kantistino. Du unuaktaĵoj. Teatra kroniko.
HV 1971:2, p. 24. KVK.

Barkoĥba-ludo.
HV 1971:4, p. 22.

A rememénység nyelve (Lingvo de la espero).
En: I. Tótfalusi: Bábel örökében (Babela heredaĵo). Budapest: Móra Könyvkiadó 1972. 204 p. (p. 194-197).

Niaj landaj zorgoj: Laboruldefendo; Nehungaraj gentoj.
HV 1972:1, p. 26. -kvk-

Zanzo.
HV 1972:3, p. 22. kk.

Interesaĵoj: Insekto-ĥoro; Superpapero; Defendo de akvokvalito; U-vitamino.
HV 1973:4, p. 25. kvk.

Interesaĵoj: Ondoj de gravitado; Savi la abelreĝinon.
HV 1974:2, p. 21. kvk.

Grekoj en Hungarlando. Pri la enmigrantoj.
HV 1974:2, p. 25. kvk.

La hungara socialisma kulturo.
HV 1974:4, p. 9-10.

Pri la iama "Sudhungarlanda Stelo"
HV 1975:1, p. 16. K. K.

9.9 DIINO HERTHA

Noveloj de K. Kalocsay.
Editoris A. Csiszár.

Chapeco, Brazilo: Fonto, 1992.
Fonto-Serio n-ro 22.

Kovrilo dukolora, plastumita.
21 x 14 cm, 72 p.

El la postlasaĵo de Kalocsay.

C. E. R. Bumy en *La Arto Poetika* diras:

Vendiĝas la romanoj, kvazaŭ pano,
sur versojn – kraĉas la samideano.

Malgraŭ tiuj ironiaj vortoj, Kalocsay senlace kultivis la poezion, ĉar la liriko forte ligiĝis al lia koro. Li verkis entute unu teatraĵeton[127] kaj kvin novelojn. En tiu tereno lia agado estas magra.

El la ĉi-libre prezentitaj kvin noveloj kvar estas postlasaĵo kaj tri erotikaj.

La unuan noveleton, pri la juna Zamenhof voĉlegis Kalocsay en la *Zamenhofa vespero* en en 1937, kaj en la Grupo Konkordo (Budapest) en 1959. Ĝia titolo estis pruntita de la poemo de Zamenhof: *Mia penso*[128].

Alia rakonto: *Esti vidvino*[129] estas verkita sub la plumnomo Ista Makler (modifo de la Esperanto-vorto "makleristo"). En la antaŭparolo oni legas, ke tiun plumnumon kreis Kalocsay ekskluzive por tiu novelo. Temas pri tio, ke en 1974 – sub titolo: *Ĉu vi volas esti mia vidvino?* – A. Csiszár verkis satiraĵon pri stranga edziĝo de konata poeto, tiutempe ankoraŭ vivanta persono. La historio tiel plaĉis al Kalocsay, ke li ampleksigis, poluris la rakonton. Laŭ lia tralaboro naskiĝis la nuna novelo lerte plektita el sprito, moko kaj kuriozaĵo. Tamen Kalocsay ne volis alproprigi la aŭtorecon.

Peter Peneter, aŭtoro de SEKRETAJ SONETOJ, verkis la sekvajn tri novelojn: *Kiel naskiĝis Abato Guibert; Renkontiĝo kun la diino Hertha; Mia Géza.* Post la apero de SEKRETAJ SONETOJ (1932) aperis nenio de Peter Peneter. La manuskriptoj de la nuna, unuafoje aperigitaj peneteraĵoj ne estas datumitaj, la flavaj folioj ne konfesas: kiam verkis ilin Peneter. Verŝajne longe dormis tiuj raraĵoj en la paperĝangalo de Kalocsay.

*

Estas domaĝe, ke Kalocsay ne povis plenumi verkadon de planitaj noveloj. Ekzemple la sekva rakonto eĉ ĝia sinoptiko estas interesa legaĵo. Jen:

Margarita kaj Bumy[130]

Margarita Alice Piroska estas la vera nomo de M. Alice Pik.
Bela virino, kiu volas ŝajni viro. Cigaro. Ne en pantalono, sed en vireska robo, nomita "Bluŝtrumpulino"[131].

C.E.R. Bumy – kiel kursgvidanto Esperanta. Li havas strangan instru-metodon -- Dante: la INFERO. Margarita estas la sola, kiu restis ĝisfine de la E-leciono. Evidentiĝis, ke ne Esperanto ŝin altiras, sed C.E.R. Bumy.

Fino de la kurso. – Redakcio de Literatura Mondo, kie troviĝas Margarita. Ŝi ĉion legis, ĉiujn gazetojn, manuskriptojn. – Venas ankaŭ C.E.R. Bumy.
Mi ne scias, kio estas inter ili. M. Alice Pik neniam perfidis, kaj C.E.R. Bumy estas ĝentlemano.

Kial Margarita amas Bumyn? – Ĉar li estas freneza. Li okupiĝas pri Esperanto, kio estas senespera afero. Sed kial? Ĉu ĝi ne estas praktika, eĉ nemalhavebla? Ĉu la racio ĝin ne postulas? Ĝuste tial ne, ĉar la racio ĝin postulas. Kion la racio postulas, neniam efektiviĝos inter la homoj. La homo estas kontraŭdialektika estaĵo.

(Laŭ la manuskripto de Kalocsay)

*

Vana bedaŭro pri la abortitaj rakontoj kaj pro tio, ke Kalocsay ne ambiciis eternigi sian nomon kiel romanverkisto, novelisto. Ĝuste tial la nun aperintaj rakontoj estas unikaĵoj en lia verkaro.

Eta SZIGETI-KARDOS

127 Ĝi aperis en ARĜENTA DUOPO 2-a vol. p. 247-274 kaj kelkfoje estis prezentita en Esperanto-kunvenoj.
128 Antaŭe ĝi aperis en Esperanto 1933/12, (400). p. 193-194; en: Norda Prismo 1957:4, p. 182-185.
129 Ĝi aperis unuafoje en Literatura Foiro 1983:78. p. 2-10.
130 Inter la pseŭdonimoj de Kalocsay M. Alice Pik kaj C. E. R. Bumy fariĝis tiel karaj al lia koro, ke li intencis la du fantazie elpensitajn figurojn vivigi ankaŭ en rakonto.
131 Virino afektanta literaturan guston kaj scion, kaj tiel perdanta sian virinan ĉarmon.

9.9.1 Bibliografio

Berveling, G.: *Diino Hertha.*
Fonto 1992:141, p. 33.
Thorsen, P.: *Klasika skermo en du onoj.*
LF 1992:139, p. 269.
Verloren van Themaat, W.: *Diino Hertha.*
Fenomeno 1993:junio, p. 9.

ĈAPITRO 10

LA PROZA TRADUKINTO

10.1 ENKONDUKO

En la literatura agado de Kalocsay oni ofte preteratentas la prozan tradukiston, malgraŭ, ke lia laboro ankaŭ ĉi-terene estis signifa. La kaŭzo de la neglekto estas, ke el liaj prozaj tradukoj pluraj – ankaŭ pretendemaj noveloj kaj rakontoj – aperis sub pseŭdonimoj aŭ litersignoj ĝis nun nekonataj.

En 1974 Kalocsay planis kunmeti novelaron el la hungara. Li elektis verkojn de la tiutempaj modernaj novelistoj. El la kolektaĵo kelkajn pecojn tradukis la stabo de Hungara Vivo. La kontribuo de Kalocsay estas tri. La planita libro ne efektiviĝis. La tradukitaj pecoj, inter ili tiuj de Kalocsay, poste aperis en Hungara Vivo kaj en la dua eldono de HUNGARA ANTOLOGIO.

30 Noveloj kaj rakontoj tradukitaj de Kalocsay disŝutite en revuoj – ankaŭ jam malaperintaj – mergiĝis en la maron de literoj. Ili certe meritus represigon, kiu plenigus ne maldikan volumon.

10.2 LA PAĜIO DE L' REĜINO

Unuakta komedio de
E. Heltai kaj E. Makai.

El la hungara tradukis K. Kalocsay.

Budapest: Hungara Esperanto Servo.
1922. (Sur la kovrilo eldonjaro 1921).

15 x 12 cm, 31 p.

La libreto apartenas al la samformata serio, kiun rekomendis la *Esperantista Literatura Asocio* sub la devizo: *"Per Esperanto al la Tutmondo"*

Pri la enhavo de la komedio:

Unua sceno:
La poeto laboras super dramo, kies titolo estas: LA PAĜIO LONGOBARDA. Temas pri tio, ke Teodolindo, la voluptema edzino de la reĝo longobarda, delogas Pipinon, la brunharan paĝion, dum la nenion konjektanta edzo batalas kontraŭ la vizigotoj.
La poeto planas, ke la amanta paro devos pagi per la vivo pri sia peko. *Do tion postulas la morala mondordo kaj la poeta justo-faro.*

Dua sceno:
Ĉe la poeto vizitas bankiero (li estas la domposedanto), bankieredzino kaj ties "kuzo", la kadeto. Ili venis observi la loĝejon por fari renovigon.

Tria sceno:
La bankieredzino kaj la kadeto restas solaj en la ĉambro. Ili tuj ĉirkaŭprenas kaj pasie, longe kisas unu la alian.

Kvara sceno:
Katinjo, la dommastrino de la poeto klaĉas, kion la tuta domo scias, ke la bankieredzino kaj la kadeto kokras la edzon. Pri la afero – kompreneble krom la edzo – nur la poeto ne scias, ĉar la poetoj – opinias la dommastrino – tion ne vidas, kio estas antaŭ iliaj okuloj.

*

La poeton malpli interesas la amrilato de la doma triopo, li elkovas novan scenon de la dramo, t. e. la reĝo Alarik venos hejmen el la batalo kaj surprizos la perfidulojn.

*

Kvina sceno:
La poeto sidas en balancoseĝo: aperas la bankieredzino kiel reĝino kaj la kadeto, kiel paĝio. Ili kisadas malantaŭ la paravano. Jen venas ankaŭ la bankiero kiel reĝo.
La poeto kaj la reĝo konsentas, ke la reĝo ŝuldas al sia rango, krono, do vidiĝas unusola solvo: per sango lavi la makulon, kiu trafis la honoron. La reĝo eltiras la glavon, sed la poeto proponas antaŭe ŝtelaŭskultadon de la geamantoj. Kaj jen: la reĝino ludadas per la bukloj de l' paĝio genuante ĉe ŝiaj piedoj.

Sur silkbukloj viaj mia mano mola...
Ho vi, mia sonĝo, kaj sopiro sola!
Kiel sunon ombr' vi sekvis min fidele...
Kio nin atendas, ho paĝi', malhele?
Jen malluma, densa nokto sen stelaro...
Mi ne longe ludos jam kun silkhararo.
Mi konjektas en la densa nokt' ĉagrenon:
Mi per larmoj lavos mian silkkusenon.

Kaj la ŝtelaŭskultantoj aŭdas la voĉon de la paĝio kun gitarakompano:

Am' mia estas ho reĝino.
Malgoja fablo-histori':
Jen, estis blonda knab' de sonĝoj,
Rigardis al stelaro li.
Rigardis al la steloj, kvankam
Li sciis – pri l' malĝoja fin'.
Reĝin vi estas, mi: paĝio...
Domaĝe je ni, ho reĝin'!
...
Ne kunplektiĝos eĉ sur tombo
Rozujoj du kun ruĝa flor',
El niaj koroj disigitaj
Kreskinte dum meznokta hor'.
Ho ne kunfandos nian amon
Eĉ tombo, kiu kovros nin.
Eĉ morti estos senvalore...
Domaĝe je ni, ho reĝin'!

Aŭdante la tristajn versojn la poeto kaj la reĝo estas kortuŝitaj ĝis larmoj. Tamen Alarik denove elingigas sian glavon: *Ha perfideluloj, venis la moment'!*
La pekuloj falas surgenuen kaj petegas indulgon reciproke por la alia.

La reĝo hezitas. La poeto instigas lin senpardone agi.

Ĝis morgaŭ prokrastiĝo venĝe pik' – proponas la reĝo.

La poeto persistas:

Vi freneziĝis, kara Alarik'!
Por morgaŭ nia venĝ' ne restas!
Moralo venkos ja, dum mi ĉeestas,
Ĉu tuj indulgas vi, Majesto,
Do kial la heroa vesto?
Ja kontraŭ gotoj estas vi hero'...
Sinjor', vi estas edz', komprenu do!
Al viro decas virkonduto!.

Laŭ la poeto *por la drama disĉiplin'* la paĝio devas morti, kaj ankaŭ la kulpa virino.

Ja fine estas homo ankaŭ mi – ĝemas la reĝo kaj ankaŭ li ekgenuas kaj jen ĉiuj tri petegas al la poeto:

Indulgu nin, indulgu nin!

La poeto enpensadas: la edzo estis ĉiam en batalo. La enuajn horojn de la reĝedzino gajigis la paĝio, kiu ne povis kontrŭstari al la deloga virino. Kio estas prava, tio estas prava.

Tamen la konflikton oni devas iel solvi (almenaŭ en la dramo). Kion fari?

Laŭ la sagaca diro – pli da okuloj ja pli vidi povas – do ili sidiĝis por malligi la nodon de la konflikto.

Laŭ la paĝio el inter ili estas unu pekulo: la reĝo mem, kiu neglektis la junan edzinon kaj per tio li mem plektis la amrilaton. Estu iu edzo, aŭ militestro! Mortu la reĝo!

La ideo plaĉas ankaŭ Teodolido!

Alarik jene lamentas:

*Ŝi trompis min, kaj estas **mi** puninda!*
Ĉu la justeco estas tiel blinda?
Ĉu amindumu la amat' plezure,
Puniĝu edz' duoble kaj terure?
Poet', ho faru juston nun subitan,
Malligu nodon de ni kunligitan.

La poeto konsentas la grandiozan ideon:

La paĝio estas prava. Li estas juna kaj la juneco estas la pravo. Vere, plej bone estos, kara Alarik', se vi mortos. Vi vivis jam sufiĉe, vi estas jam maljuna, ne baru vojon al la feliĉo de la gejunuloj. Rigardu, jen la glavo... faru al ni la komplezan servon kaj falu en vian glavon, kiel la veraj herooj.

Alarik akceptas la proponon, falas en la glavo.

– *Kia koro... vere longobarda koro* – diras la poeto. – *Estu feliĉaj, niajn infanetojn!*

Sesa sceno:

La poeto vekiĝas. Li malfermas la okulojn kaj serĉas la kadavron de Alarik. Fine li divenas, ke li sonĝis.Tamen en lia dramo la dorma solvo ne estas akceptebla. La poeto estu kruela, ĉar ankaŭ la vivo estas tia.

*

Venas la dommastrino kaj rakontas al la poeto pri la skandalo kiu nokte okazis en la hejmo de la bankiero. Nun komenciĝos la proceso por eksedziĝo. La bankiero pravas, fine kion li ja faru. Li estas jam maljuna por dueli kun la kadeto.

Sepa sceno:

La bankiero enkuras kun revolvero en la mano. Li trankviligas la ektimiĝantan poeton kaj dommastrinon, ke en la pafilego ne estas kuglo.

Do, kion mi faros nun? – li demandas kaj klarigas.

– *Mi komencigos la eksedziĝ-proceson kaj – kiomfoje mi malprosperos, ĉiam mi reedziĝos.*

*

Post ĉio ĉi en la kapo de la poeto definitive elformiĝas la la historio de lia verko. Anstataŭ tragedio ĝi estos farso. La longobarda reĝo furia fariĝos pacema bankiero, la paĝio estos braveta kadeto, la alloga reĝino estos alloga bankieredzino, fine la titolo de la verko ŝanĝiĝos jene:

LA BOVO KUN LA ORAJ KORNOJ

***

Tiom pri la komedio, kiu estis kelkfoje prezentita antaŭ Esperanta publiko. Jen:

1921 Budapest
1923 Nürnberg
1931 Tallin
1962 Budapest

La reĝisoro de la kvar prezentado estis Julio Baghy, krome li ludis la rolon de la bankiero. En 1921 kaj en 1923 Kalocsay ludis la rolon de la poeto.

La originala teatraĵiŝo
de la unua prezentado
la 9-an de Augusto 1921.
en la teatro „Colosseum"
dum la
POSTKONGRESA
FESTO EN BUDAPEST

LA PAĜIO DE L' REĜINO

Unuakta komedio de Euĝeno Heltai — Emilo Makai.
Tradukita de Dr. Kolomano Kalocsay.

PERSONOJ:

Poeto ... ... Sro Dr. Kolomano Kalocsay
Bankiero ... ... Sro Julio Baghy
Bankier-edzino ... ... Fino Margareto Tomán
Kadeto... ... ... Sro Miĥaelo Sárosi
Mastrino ... ... Fino Ireno Zacsek

Reĝisoro: JULIO BAGHY aktoro.

10.2.1 Bibliografio

□ Esperanto 1922/219.

10.3 DU KOKCINELOJ; LA MONTRO[132]

Noveloj de G. Gárdonyi.

El la hungara tradukis
Kolomano de Kalocsay.

Budapest: Esperantista Literatura Asocio, 1923.
14 x 10 cm, 32 p.

Sub la devizo "Per Esperanto al la Tutmondo" aperis la kajero el la hungara literaturo, rekomendita de la *Esperantista Literatura Asocio.* Vere, la du noveloj apartenas al la perloj de la hungara novelarto. La verkisto Géza Gárdonyi estis vilaĝa instruisto, kiu funde konis la provincan vivon.

La *Du kokcineloj* estas emocia rakonto pri la malfeliĉa sorto de blinda kamparanisto, Vica. La junulino sopiras je amo, kiun la sorto malofte donas por malriĉaj kaj blindaj knabinoj. Tamen amo brulas en la proksimeco de Vica, amo de la fratino Klarinjo kaj ties fianĉo. Kaj tiu ardo bruligas la blindulinon. Ĝi enamiĝas al la amindumanto de la fratino. Kvankam Vica ne esperas reciprokan amon, tamen ŝi ne povas elteni, kiam la adorata junulo primokas ŝin. Pale, kvazaŭ somnambulo, Vica ekiras sen blanka bastoneto al la fluego *Tisza* (Tibisko), sed ŝi neniam plu revenas.

La alia novelo *La montro* prezentas la karakterizajn trajtojn de la hungara popolanimo, la specialan hungaran kuraĝon, ofte preskaŭ infanan naivecon.

La tradukinto anstataŭ la nenaturaj, pezaj vortkunmetoj uzis kelkajn neologismojn: *langvora* (malvigleco, malstreĉiĝo de la korpaj aŭ animaj fortoj, sen difinita kaŭzo), *ŝrumpi* (kuntiriĝi kaj sulketiĝi pro seko, maljuneco ktp).

Certe ankaŭ tiuj neologismoj kontribuis, ke la lingva stilo de la traduko – eĉ post multaj jardekoj – ne arkaikiĝis, kaj ĝi freŝe gardas la ĉarmon de la originalo.

132 LA MONTRO estis represita en: Norda Prismo 1966:1, p. 14-16.

10.3.1 Bibliografio

(las) (T. Schwartz): *Du kokcineloj; La montro.*
LM 1923/19.
□ Esperanto 1923/110.
□ HE 1923:1, p. ?



10.4 MORGAŬ MATENE

Dramo de F. Karinthy.
Kun antaŭparolo de la aŭtoro.

El la hungara tradukis K. de Kalocsay.

Budapest: Hungara Esperanto-Instituto, 1923.
15 x 11 cm, 138 p.

Frigyes Karinthy estas unu el la plej eminentuloj de la moderna hungara literaturo.

Lia nomo estas konata en Esperantujo: li estis prezidanto de la *Hungarlanda Esperanto-Societo* dum la jaroj 1931-1938.

En la verkaro de Karinthy, krom la profunde filozofiaj noveloj, multnombre estas scenoj por kabareto, malgrandaj groteskaĵoj ktp. Tiuj – ŝajne "bagateloj" – plej ofte tuŝas eternajn homajn problemojn en kadro de mokadaj, satiraj scenoj.

En la antaŭparolo la aŭtoro eksplikas siajn ideojn pri la dramo.

Iom pri la enhavo de la triakta teatraĵo:

La ĉefrolanto estas inĝeniero Ember, kiu inventas novtipan aeroplano-torpedon direkteblajn per elektraj ondoj de sur la tero. Li estas primokata, neglektata, de siaj amikoj kompata, kaj de la edzino Mario forlasita. Cetere Mario estas enamiĝinta al la aristokrato grafo Beniczky.

La grafo volas forigi la inĝenieron, sed vidante, ke tiu rifuzas duelon, li proponas lotumi inter ili memmortigon. Ember malgajnas kaj elektas por plenumo de memmortigo la tagon de sia provo-flugo.

En la dua akto aperas finna doktoro Olsen, kiu proponas al Ember kuraci liajn nervojn.

La tria akto – tago de la provo-flugo – prezentas la jam operaciitan inĝenieron kiel tute alian homon. Post la sukcesa flugo jam li atakas grafon Beniczky, kiu forkuras. Ember konfesas al la edzino, ke li jam estas libera de sia antaŭa sento:

"Mario, kiel feliĉa mi estas. Mi jam ne estas enamiĝinta al vi... kiel feliĉa mi estas."

*

La traduko de la dramo ne estis facila laboro. Kalocsay postparole rimarkas:

"Mi penis fari la tradukon kiel eble plej facile komprenebla kaj tamen redoni la specialaĵojn de la originalo, la abruptan parolmanieron dum ekscitaj scenoj."

Certe la peza lingvaĵo de la teatraĵo devigis la tradukinton uzi neologismojn: *avantaĝo* (favoro), *diskvalifiki* (malhonori), *ekstravaganco* (eksterordinaraj kutimoj), *hangaro* (ŝirmejo por aeroplano), *satisfakcio* (kontentigo) ktp. Entute 22 vortoj estas listigitaj kaj klarigitaj en la Rimarkoj, kiuj ne estas registritaj en la PLENA VORTARO kaj ties SUPLEMENTO.

10.4.1 Bibliografio

G. S.: *Morgaŭ matene*
Esperanto 1923/181.
Skito (Hohlov, N.): *Morgaŭ matene.*
LM 1923/87-88.



10.5 ARTHISTORIO I.

Verkis: Antono Hekler.

La Esperanto-eldonon prilaboris:
A. Kampiss,

Tradukis: K. Kalocsay.

Budapest: Literatura Mondo, 1934.
104 p. teksto + 112 bildopaĝoj.
23 x 15 cm. Dukolora kovrilo.

Tiu ĉi libro estas komenco de serio priarta, supozante, ke ĝi trovos legantojn, ĉar priartaj verkoj en la Esperanto-literaturo ne tre abundas.

La unua libro de la planita serio estas bone elektita. La verkisto de ARTHISTORIO estas profesoro en la *Universitato de Budapest,* fame konata, kiel unu el la plej modernaj arthistoriistoj.

Ĉi tiu volumo estas tre taŭga instruilo – kvazaŭ bazgrada lernolibro – ĉar mallonge, tamen funde prezentas la arthistorion de la mondo.

La Esperanto-eldono havas naŭ ĉapitrojn, kiuj pritraktas la arkitekturon, la skulpt-arton, pentro-arton de la Eŭropa kontinento kaj la lulion de la Eŭropa arto. La libro kondukas nin tra jarcentoj de la arta evoluo: *Egipto, Babilono* kaj *Asirio, Persio, Kreta-Mikena arto, Greklando, Italio, la prakristana kaj Bizanca arto, la mezepoka kaj gotika arto.*

La tekston akompanas bildopaĝoj, sur kiuj 143 klaraj fotografaĵoj montras al la leganto la ĉefajn monumentojn, pentraĵojn kaj konstruaĵojn de ĉiu pritraktita epoko. Eĉ nur la trarigardo de la bildoj donas lecionon: ne nur rigardi sed ankaŭ vidi.

La verkon tradukis Kalocsay en mirinda klara stilo, malgraŭ, ke la fakaj esprimoj en Esperanto tiutempe ne estis tre prilaboritaj.

Literatura Mondo planis aperigi ankaŭ la II-an volumon, kiu pritraktos la artojn ekde la renesanco. Pri la plano nerealiĝinta rakontis Kalocsay:

Kiel proksimiĝis la fino de la tridekaj jaroj, la cirkonstancoj pli kaj pli malboniĝis ankaŭ en Hungario. Jam estis sentebla la antaŭvento de la mondmilito. La presejo, kie oni presis la revuon Literatura Mondo, en la urbo Vác, en 1938 ĉesigis la presadon de esperantaĵoj. Poste Vilmos Bleier, la vartinto de Esperanto-libroj kaj lia helpanto Ferenc Braun elmigris kaj tiu ĉi lasta en Honkongo provis daŭrigi la eldonan agadon. La dua volumo de la ARTHISTORIO jam estis kompostita, eĉ korektita, sed la milito (kune kun la dua volumo de la Vallienne-romano ĈU LI ?) senspure glutis ĝin.

*

Certe estas granda perdo por la Esperanto-literaturo la manko de la II-a volumo, tiom pli, ĉar hodiaŭ jam la unua parto de la ARTHISTORIO estas raraĵo, kiu donas ĝuon por la okuloj, instruon por la cerbo.

10.5.1 Bibliografio

KONATIĜU p. 13.
BG 1933:2, p. 34.
Wessel, M. J.: *Arthistorio I.*
LL 1934:4, p. 55-56.
Leigh-Browne, F. S.: *A. Hekler: Arthistorio I.*
□ BrE 1935:januaro, (357), p. 15.


BENITO MUSSOLINI

VIVO
DE ARNALDO

EL LA ITALA:
K. KALOCSAY

1934
ELDONIS «LITERATURA MONDO», BUDAPEST

10.6 VIVO DE ARNALDO

Verko de Benito Mussolini.

El la itala tradukis K. Kalocsay.

Budapest: Literatura Mondo, 1934.
20 x 13 cm, 106 p. Bindita kaj broŝurita.

Kondamnita traduko de Kálmán Kalocsay.

En la verkaro de Kalocsay ĉi tiun tradukon ĝenerale oni prisilentas, ĉar sen klarigoj la nomo de Benito Mussolini, sugestus, ke temas pri faŝisma propaganda verko. Poste, dum la komunisma regado, junaj kaj malpli orientitaj samideanoj (kelkaj eĉ ne legis la libron), ne unufoje riproĉis la tradukanton kaj la eldonanton.

Mallonge pri la historio de la traduko.

Oni devas iom reiri en la tempo.

Post la falo de la *Hungara Konsilantara Respubliko* (1919.07.31) sekvis la jaroj de la "reordigo" (revenĝo).

La tiama reĝimo volis ekstermi eĉ la ĝermon de la marksismo-komunismo. La magistratoj persekutis la klasbatalajn laboristojn, kiuj devis agadi kaj propagandi nelege, sub egido de diversaj societoj. Ankaŭ la Esperanta movada, ĉefe HESL, servis kiel kaŝloko. La movado multe suferis pro policaj malpermesoj kaj persekutoj. Ekzemple en 1928 la polico konfiskis la la libreton NI KANTU![133] kaj la respondeca eldonanto, Vilmos Bleier suferis prizonan punon.

La atmosfero fariĝis ĉiam pli malfavora por la Esperanto-movado. En tiuj cirkonstancoj – por defendi pluajn atakojn – en 1934 *Literatura Mondo* aperigis la verkon de Mussolini en la traduko de Kalocsay. Tiu ĉi libro-eldono fare de Bleier-Kalocsay estis taktiko por intereso de Esperanto. Ili volis kvietigi la furiozon de la polico kontraŭ Esperanto. Krome ili revis pri tio, ke la esperantigita Duce-verko helpas la disvastigon de Esperanto en Italio, kaj oni povas varbi abonantojn por *Literatura Mondo,* kiu baraktis en financa embaraso. Kvankam tiu naiva espero ne plenumiĝis, tamen per diversaj manovroj ili sukcesis vivteni la revuon kaj daŭrigi la libro-eldonadon.

Skize pri la libro:
Tri tagojn – post la subita morto de la amata frato – Mussolini en la Palaco Venezia (konstanta laborloko de la ŝtatestro) komencis trarigardi la postlasitajn paperojn de Arnaldo.

Arnaldo estis ĵurnalisto kaj li gardis en la skribotablo multajn manuskriptojn, leterojn, dokumentoj pri la familio. Dum la foliumado reviviĝis en la spirito de Mussolini[134] la komuna knabaĝo kaj en Kristnasko, la 25-an de decembro 1931, li skribis la unuajn paĝojn de libro, dediĉitan al la memoro de Armando.

La aperigon de la libro finance apogis Gino Catarzi kaj la *Esperanto-Centro Itala*.

133 Vd en la 3-a volumo p. 34-36.
134 Mussolini estis ankaŭ dramverkisto kaj literaturisto. Liaj dramoj atingis sukcesojn en teatraĵoj de diversaj landoj.

10.6.1 Bibliografio

E. F.: *Vivo de Arnaldo.*
LL 1935:2, p. 113.
Hartog, Joh.: *B. Mussolini: Vivo de Arnaldo.*
NE 1935:junio, p. 193.
Csiszár, A.: *Kalocsay kaj la politiko.*
En: OMAĜE... 1-a vol. p. 54-58.

10.6.1.0 Notoj kaj referencoj

KONATIĜU p. 41.
Fonto 1992:133, p. 27-28. *Kompletigo.* Rimarkoj de G. Berveling al la artikolo de A Csiszár (Fonto 1991:130, p. 3-9).
Fonto 1992:141, p. 26-27; Eventoj 1993:0021, p. 8. *Kompletigo al la kompletigo.* A. Csiszár reagas al la rimarkoj de G. Berveling.



10.7 ROZINJO

Novelo de Gyula Török.

El la hungara originalo tradukis
K. Kalocsay.

Purmerend: J. Muusses, 1938.
19 x 13 cm, 39 p.

Represo: Saarbrücken: Artur E. Iltis, 1977.

Esperanto-Biblioteko No. 16.

Malmulton ni scias pri la aŭtoro de ROZINJO.

Gyula Török (1888-1919) komencis sian literaturan karieron kiel ĵurnalisto. Pluraj valoraj noveloj aperis de li en beletrestikaj revuoj. Ekde 1917 – kiam aperis lia unua romano: EN LA POLVO – oni konsideris lin inter la plej grandaj promesoj de la moderna literaturo. Sed lia frua morto malhelpis ke la talento de la juna verkisto plene disvolviĝu.

ROZINJO estas rakonto pri la trista sorto de virino, kiu vane sopiras la feliĉon, nek la edzo, nek la infanoj donas al ŝi ĝojon. La historio esence ne estas kuriozaĵo, tamen la rakonto ne enuigas la leganton, ĉar la verkisto estas ankaŭ lerta psikologo, kaj li interesveke prezentas la animan transformiĝon de la kompatinda Rozinjo baraktanta en prema vivcirkonstanco.

Kaj kion diri pri la Esperanta traduko? Eble sufiĉas tiom, ke ĝin interpretas Kalocsay. Ĉe la unua eldono la recenisto de *Nederlanda Esperantisto* rekomendis la libron jene:

"La nomo de Kalocsay ne fortimigu niajn komencantojn: du, tri neologismoj estas piednote klarigitaj..."

Vere, neologismoj troviĝas entute du: *koĉero* (kaleŝkondukisto) kaj *klinko* (pordo-fermilo). La simpla tamen ĉarma stilo de la tradukaĵo ne devigas la leganton por konstanta vortar-konsultado.

La represigan entreprenon de A. E. Iltis verŝajne motivis ankaŭ tio; ke ne abundas libro-forme aperintaj prozaj tradukoj de Kalocsay.

10.7.1 Bibliografio

□ NE 1938:septembro, p. 216.
Csiszár, A. *Rozinjo.*
BI 1979:3, p. 4.

10.8 PROZAJ TRADUKOJ DE KALOCSAY

Szabó, Dezső: **Parolo pri la volo.** Rakonto el la hungara.
Hungara Revuo 1919:aprilo-julio, p. 7.

Szabó, Dezső: **La legendo de la bona amo.** Novelo el la hungara.
□ HE 1920: n-roj 2, 4, 5-6.

Jókai, Mór: **Kiun el la naŭ/sep.** Novelo el la hungara.
EF 1922:12, p. 196-199; HA/1, p. 179-184; ĉi-libre p. 57-61.

Busoni, Ferruccio: **La celoj de la muzikarto.** Artikolo el la itala.
LM 1923/61-63. C. Panda.

Molnár, Ferenc: **Malfeliĉa amo.** Novelo el la hungara.
LM 1924/116-117. Kopar.

Lemaitre, Jules: **La maljuneco de Helena.** Novelo el la franca.
LM 1924/117-119. Ch. P.

Kóbor, Tamás: **Ĉe arbara rando.** Novelo el la hungara.
HA/1, p. 232-235.

Révész, Béla: **Odoroj.** Novelo el la hungara.
HA/1, p. 273-276.

Gorbatov, B.: **Akuŝo sur la insulo "Kukurbo".** Novelo el la rusa.
LM 1947/106-114. K. Stelov.

Ĉikarkov: **Sunradietoj.** Burleskaĵo en unu akto. El la rusa.
LM 1947/167-170. K. Stelov.

Pavlenko, P.: **Mia samlandano Jusupov.** Novelo el la rusa.
LM 1948/50-52. K. Stelov.

Pantelejev, L.: **Vorto de honoro.** Novelo el la rusa.
LM 1948/183-184. K. Stelov.

Gorbatov, B.: **La komercisto.** Novelo el la rusa.
LM 1949/4-18, 37-46. K. Stelov.

Puskin, Alekszandr Szergejeviĉ: **La damo de Piko.** Duono de la novelo el la rusa.
LM 1949/97-105. K. Stelov.

Ady, Endre: **Hungara problemo.** Artikolo el la hungara.
HV 1963:2, p. 9; repr. 1977:4, p. 4; MDĈ p. 76-77; HA/2, p. 163-164.

Korach, Mór: **Kontraŭaĵoj kaj konformaĵoj de la teknikaj-sciencaj lingvoj.** Artikolo el la hungara.
HV 1964:1, p. 2-4.

Szathmári, Sándor: **Vincenzo.** Novelo el la hungara.
En: S. Szathmári: MAŜINMONDO kaj aliaj NOVELOJ. La Laguna: J. Régulo, 1964. 187 p. (p. 136-175); repr. en: S. Szathmári: PERFEKTA CIVITANO. Budapest: HEA, 1988. 456 p.

Tabi, László: **Kion kapablas sitelo?; Pri sporta evento; La sekreto de la sukceso.**Tri humoraĵoj el la hungara.
HV 1965:2, p. 16-17. Anonime.

Kolozsvári-Grandpierre, Emil: **Geedziĝo en hodiaŭa maniero** Novelo el la hungara.
HV 1965:3, p. 25-28; repr. en: W. Auld: PAŜOJ AL LA PLENA POSEDO. Budapest: Hungara Esperanto-Asocio, 1989. 228 p. (p. 213-222).

Palotai, Boris: **La pendmaŝeto.** Novelo el la hungara.
HV 1967:1, p. 18-19.

Füst, Milán: **Reĝo Menas aŭ la praktika valoro de la filozofio.** Fragmento el: Habi Sadi: LIBRO de VIVLUKTOJ. Traduko el la hungara.
HV 1967:4, p. 20-22.

Kende, István: **Vjetnamaj ŝirmejoj.** Vojaĝraporto. Trad. el la hungara.
HV 1968:3, p. 5-6.

Asturias, Miguel Ángel: **La supo reakiris siajn rajtojn.** Fragmento el: MANĜANTE en HUNGARIO. Trad. el la hungara.
HV 1969:3, p. 10.

Neruda, Pablo: **La granda pokalo.** Fragmento el la libro: MANĜANTE en HUNGARIO
HV 1969:3, p. 11. Trad. el la hungara.

Heine, Heinrich: **Postparolo en la "Romancero".** Trad. el la germana.
En: KANTOJ KAJ ROMANCOJ p. 327-331. Vd en la 3-a vol. p. 75-76.

Gyurkó, László: **Lenin, Oktobro.** Fragmentoj el la monografioj pri Lenin. Trad. el la hungara.
HV 1970:1, p. 12-13. A. K.

Ortutay, Gyula: **Humanisma etnografio.** Artikolo pri la okdek-jara *Hungara Etnografia Societo.*
HV 1970:1, p. 14-15. A. K.

Hemberger, Sándor: **La hungara arto en la kurento de la internacia kooperado**. Artikolo.
HV 1970:2, p. 8. A. K.

Katkó, István: **Ĉiam aliloken.** Novelo el la hungara.
HV 1970:4, p. 2-3.

Galambos, Lajos: **Mono.** Novelo el la hungara.
HV 1971:4, p. 4-6.

Karinthy, Ferenc: **Bösendorfer.** Unuakta teatraĵo. El la hungara[135].
HV 1972:2. p. 8-10.

Mikes, György: **Bibliotek-ordigo.** Facila legaĵo el la hungara.
HV 1972:2, p. 22

Moldova, György: **La filino de la pordisto.** Novelo el la hungara.
HV1972:4, p. 8-9.

Simon, István: **La ekzemplo de Petőfi.** Poet-portreto el la hungara.
HV 1973:1, p. 1-3. V.K.

Ráth-Végh, István: **La netuŝebla verdikto:** Kulturhistoria kuriozaĵo el la hungara.
HV 1973:4, p. 27.

Vatré, Henri: **La kimra biblio.** Traduko el Esperanta teksto (NLR 4. 1959:5, p. 175-179) al la hungara.
EM 1974:2, p. 2-3; repr. en: UTAM p. 190-201.

Eörsi, István: **El la taglibro de tradukartisto.**
HV 1974:2, p. 32. K. K.

Kiss, K.: **Pri la hungaraj folklor-esploroj.** Intervjuo kun Gyula Ortutay.
HV 1974:2, p. 19. kvk.

Kristóf, Attila: **Sciencfikcia situacio;** Novelo el la hungara.
HV 1974:3, p. 25-27. K. K.

Déry, Tibor: **Amo.** Novelo el la hungara.
HV 1974:6, p. 10-14; HA/2, p. 294-301.

Fondiĝo la internacia Kodály-Societo. Sciigo el la hungara.
HV 1975:6, p. 27. K. K.

Lengyel József: **Antikritono.** Novelo el la hungara.
HV 1976:1, p. 5-7.

Csák, Gyula: **En strumpetoj.** Novelo el la hungara.
(Pl) HV 1979:2, p. 54-55.

Szakonyi, Károly: **Ili parolas pri la kvara.** Novelo el la hungara.
(Pl) HV 1984:4, p. 131-133.

Illés, Endre: **La ordono.**
(Pl) HA/2, p. 304-311.

135 La teatraĵo – prezentita de profesiaj aktoroj – en la *Hungara Kultur-Festivalo* (Budapest, 1972) rikoltis brilan sukceson.

10.9 El la fruaj prozaj tradukoj de Kalocsay

KIUN EL LA NAŬ

Novelo de Mór JÓKAI[136].

Ŝuisto malriĉa vivis iam en ĉi tiu granda urbo Budapest, kiu nenie povis riĉiĝi per sia metio.

Ne, ĉar la homoj eble komplotis, ke ili ne portas plu botojn, nek, ĉar la magistrato eble ordonis, ke de nun oni devas vendi la botojn por duona prezo; kaj la kompatindulo ja laboris tre bone, mem la aĉetintoj plendis, ke ili ne povas disŝiri la botojn, kiujn li faras; kaj li havis ja sufiĉe da mendantoj; kaj ili ja pagis honeste, neniu el ili forkuris kun nepagita kvitanco — majstro Johano tamen ne povis veni sur verdan branĉon, kiel oni diras germane, eĉ malofte li estis jam proksima al tiu stato, kiam kiel ajn sekan branĉon oni trovas bona kaj konvena por malsuprenrigardi de ĝi. — Sed kompreneble tio estis nur malplena parolo, ĉar majstro Johano estis vera kristano kaj kristana homo ne pendigas sin, kiel ajn premanta estis lia stato.

Do, por diri la kialon, kial ne povis akiri majstro Johano havon kaj riĉon, ĉar aliflanke Dio benis lin tiel senmezure, ke ĉiun jaron regule naskiĝis al li infano, jen filo, jen filino kaj ĉiuj estis sanaj kiel la fero.

— Ho Sinjoro, mia Dio! — ĝemspiris majstro Johano ĉe ĉiu nova numero: kiam venis la sesa, la sepa, la oka: — kiam venos la punkto post ĉi tiu longa linio? Kaj alvenis la naŭa, mortis la edzino — jen estis punkto.

Majstro Johano restis sola kun naŭ infanoj. Hej, multe diras tiu ĉi frazo!

Du aŭ tri el ili jam iradas en lernejon, al unu aŭ du oni devis instrui la iradon, alian porti sur la brako, alian manĝigi, al alia kuiri kaĉon; ĉi tiun vesti, tiun lavi kaj por ĉiuj perlabori monon. Certe, karaj baptanoj, tio ne estas facila ofico, bonvolu ja provi!

Se oni devis fari ŝuojn: jen, per unu fojo, naŭ ŝuoj. Se oni devis tranĉi panon: jen unu fojo naŭ tranĉaĵoj. Se oni devis pretigi liton: jen, la tuta ĉambro, de la pordo ĝis la fenestro, estas ununura lito, plena de grandaj kaj malgrandaj kvazaŭhomaj kapetoj.

— Ho, Sinjoro, mia Dio, kiel troe vi benis min, — ĝemis al si multfoje la pia botisto, dum li, eĉ post noktomezo, martelis la plandon, por ke li povu nutri la korpojn de tiel multaj animoj, aŭ dum li ekpuŝis jen unu, jen alian malbone kondutantan dum dormo. Jes ja, ĝi estas naŭ, bela, tuta, ronda 9-cifero. Nu, sed dank' al la bona Dio li ja ne havis kaŭzon por plendi: ĉiuj naŭ estas sendifektaj, bonmoraj, belaj kaj bonaj, benitaj per sana mano kaj piedo kaj stomako; kaj prefere naŭ pecoj da pano ol unu glaso de medikamento, kaj prefere naŭ litoj, ol unu ĉerko inter ili. Dio gardu kontraŭ tio ĉiun senteman patron kaj patrinon, eĉ se restos al li ok, post kiam oni forprenis unu.

Sed la infanoj de majstro Johano havis ja nenian intencon por morti: estis ja destinite, ke ili, ĉiuj naŭ, finlaboros sian vivon, cedante al neniu sian lokon; al ili malutilis ja nek la pluvo, nek la neĝo, nek la seka pano.

Iun kristnaskan vesperon majstro Johano venis malfrue hejmen el la granda ĉirkaŭkurado, li

portis hejmen pretajn laboraĵojn kaj enspezis malmultan moneton necasan por daŭrigi sian metion kaj por aranĝi la ĉiutagajn bezonojn. Rapidante al sia hejmo, li vidis ĉe ĉiu stratangulo tablon ŝarĝitajn per oritaj kaj arĝentitaj anĝeloj kaj per sukerpupetoj, kiujn la bonaj vendistinoj vendas al la knaboj, kiuj kondutas bone: ili eĉ demandas pri tio, por ke ili ja ne vendu ion por malbonaj infanoj. Majstro Johano haltis tie kaj ĉi tie, eble li devus aĉeti ion? Sed kiel? Ĉu al ĉiuj naŭ? Tio estas tro multa. Ĉu al unu? Por ke la ceteraj enviu lin? Ne, li donas al ili alian kristnaskan donacon, kaj belan kaj bonan kiu ne rompiĝas, nek eluziĝas, kaj pro kiu ĉiuj povos ĝoji, tamen ne povas ĝin preni unu de la alia.

— Nu infanoj: unu, du, tri, kvar: ĉu vi ĉiuj ĉeestas: — li diris veninte en la rondon de sia naŭkapa familio. — Ĉu vi scias, ke hodiaŭ estas kristnaska vespero? Ĝi estas festo. Tre ĝoja festo! Hodiaŭ vespere ni tute ne laboras, sed ni nur ĝojos, ĉiuj.

La infanoj tiel ekĝojis pro tio, ke ili devas ĝoji hodiaŭ, ke ili preskaŭ renversis la domon per sia bruo.

— Atendu ja, kio estus, se mi instruus al vi tiun tre belan kanton, kiun mi scias. Jes, tre belan kanton mi scias, mi konservis ĝin por ĉi tiu tago, kiel kristnaskan donacon.

La etuloj kun granda bruo grimpis-rampis sur la genuojn, al la kolo de sia patro: ili preskaŭ renvesis lin por tiu bela kanto.

— Nu! Kion mi diris? Nur se vi bone kondutas. Poste vi devas starigi bele, en vico. Jen, tiel! La pli grandaj antaŭen, la pli malgrandaj malantaŭen.

Tiel li starigis ilin, en vico, kiel la orgentubojn. La du plej malgrandaj venis sur la genuojn kaj sur la brakojn de la patro.

— Kaj nun silenton! Mi kantos antaŭe, kaj vi kantos poste, post mi.

Kaj nun, kun serioza, pieca mieno, preninte de sia kapo la verdan ĉapon, majstro Johano komencis tiun belan, bonsonan kanton, kiu jene komenciĝas:

"Benata tago de naskiĝ' de Kristo"...

La pli grandaj geknaboj lernis la melodion jam post la unua aŭdo, pli multan penon bezonis la pli malgrandaj, ili ĉiam forturnis la arion kaj perdis la takton. Sed fine ĉiuj sciis ĝin, kaj jen estis la granda ĝojo, kiam ĉiuj naŭ, per unu fojo, per altaj kaj pli altaj voĉoj eksonigis la belan kanton, kiun la anĝeloj mem kantis je tiu memorinda nokto, kaj kantas eble ankaŭ nun, kiam la harmonia voĉo de tiaj belaj, senkulpaj naŭ animoj petas kun sincera ĝojo la eĥon de ili.

Certe ili ĝojas supre en la ĉielo pro la kanto de infanoj.

Sed tiom malpli oni ĝojas pro ĝi supre, en la unua etaĝo.

Riĉa, fraŭla sinjoro loĝas tie, sola en naŭ ĉambroj: en la unua li sidas, en la dua dormas, en la tria pipfumas, en la kvara tagmanĝas: kiu scias, por kio li uzas la ceterajn.

Li havas nek edzinon, nek infanon, sed li havas tiom da mono, ke li mem ne scias, kiom.

Tiu riĉa sinjoro ĝuste sidis tiun vesperon en sia oka ĉambro, kaj pensis pri tio, kial ne havas la manĝaĵo guston, kial estas nenio interesa en la ĵurnaloj, kial ne estas sufiĉe da aero en la grandaj ĉambroj, kial ne estas kvieta dormo en la mola, risorta lito — kiam el la teretaĝa ĉambro de majstro Johano, komence mallaŭte, poste ĉiam pli kaj pli laŭte ekaŭdiĝis al li tiu kanto instiganta por ĝojo.

Komence li ne volis pri ĝi atenti, li pensis, ke ĝi baldaŭ finiĝos, sed kiam ili rekomencis jam la dekan fojon, li ne povis plu toleri la aferon.

Li dispistis inter la fingroj sian estingiĝintan cigaron, kaj iris mem, en dormojako, en la loĝejon de la botisto.

Ili ĵus finis la strofon, kiam li enpaŝis, kaj majstro Johano kun plena estimo stariĝis de sia tripieda seĝo antaŭ la granda sinjoro.

— Vi estas majstro Johano, la botisto, ĉu ne — demandis la riĉa sinjoro.

— Jes, je via servo, sinjoro, ĉu vi ordonas eble lakŝuojn?

— Ne tial mi venis. Kiel multajn infanojn vi havas!

— Jes ja, mi havas, sinjoro moŝto, grandajn kaj malgrandajn! Multaj buŝoj, se temas pri manĝado!

— Eĉ pli multaj, se ili kantas. Aŭdu majstro Johano, mi volas fari vin feliĉa homo. Donu al mi unu el viaj infanoj, mi adoptos, mi edukos lin, li venos al mi por eksterlandaj vojaĝoj, li fariĝos sinjoro, kaj povos helpi ankaŭ la aliajn.

Majstro Johano malfermis ege larĝe la okulojn post tiu ĉi diro; ĝi estis granda afero! Sinjoron fari el iu lia infano! Kiun ne surprizus kaj enpensigus ĉi tio!

Ĉu li ne donu? Certe li ja donas, tio ja estas granda feliĉo!

— Nu, rapide elektu unu el ili; poste ni iru.

Majstro Johano komencis la elektadon.

— Jen Aleĉjo! Nu, lin mi ne donos. Li lernas bone. Li estos pastro; la dua: ŝi estas knabino, knabinon la sinjoro moŝto ne bezonas; Fraĉjo: li jam helpas min en la metio; sen li mi ne povas ekzisti; Johaĉjo: jen, jen, li estas baptita laŭ mia nomo, mi ne povas fordoni lin; la malgranda Joĉjo: li ja estas tuta portreto de sia patrino, kvazaŭ ŝin mem mi vidus, ĉu li povus manki en la domo? Nu sekvas ree knabino, do nenio; poste jen estas Paŭĉjo. Ĉi tiu estis la plej kara al sia patrino, ho la kompatinda virino turniĝus en la ĉerko, se mi donus lin al fremdulo; nu tiuj ĉi du lastaj estas tro malgrandaj, kion farus la sinjora moŝto kun ili?

Okazis do, ke li atingis la lastan, tamen li ne povis elekti. Poste li komencis de malsupre al supre, sed la rezulto estis la sama: li ja ne scias kiun fordoni el ili, ĉar ĉiun li amas egale.

— Nu, buboj, elektu mem! Kiu volas foriri, fariĝi sinjoro, veturi en kaleŝo. Parolu do, he! Paŝu antaŭen, kiu volas.

La kompatinda botisto jam preskaŭ ekploris dirante ĉi tion; sed la infanoj dum ĉi tiu instigado tiris sin ĉiuj malantaŭ lian dorson, unu kaptis la manon, alia la piedon, alia la ledantŭtukon de sia patro, sin alkroĉinte, sin kaŝante de la granda sinjoro.

Fine mastro Johano ne povis plu reteni sin, ĵetis sin inter ilin, ĉirkaŭprenis ĉiujn, kaj komencis larmi sur ilian kapon, kaj tiuj ploris, ploregis kun li.

— Ne eble, sinjoro moŝto, neeble! Petu, volu ĉion en la mondo, sed miajn infanojn al neniu mi povas doni, se la bona Dio ja donis ilin al mi.

La riĉa sinjoro diris, ke tio estas lia afero, sed li faru do por lia plaĉo almenaŭ tiom, ke li ne kantu plu kun siaj infanoj, kaj akceptu de li mil florenojn pro tiu ofero.

Majstro Johano eĉ diri ne aŭdis ĝis nun la vorton: mil florenoj, kaj nun li sentis, ke ĝi premiĝas en lian manon.

La sinjoro moŝto reiris en sian ĉambron por enui, kaj majstro Johano ege miris la nekonatan figuron de la milflorena bankbileto, poste time li fermis ĝin en sia kesto, metis la ŝlosilon en sian poŝon kaj silentis.

Silentis ankaŭ la etularo. Kanti estis malpermesite.

La pli grandaj infanoj malhele sidis sur la seĝoj, silantigante la pli malgrandajn: oni devas ne kanti, la sinjoro tion ekaŭdas.

Majstro Johano mem iradis, iradis tien kaj reen en la ĉambro kaj krude li forpelis de si la malgrandan bubeton, la favoratan de sia edzino, kiam li iris al li petante, ke li instruu lin denove pri tiu bela kanto, ĉar li jam forgesis ĝin.

— Kanti estas malpermesite.

Poste grumblante li sidiĝis al la laboro, komencis tranĉi fervore la ledon; ĝis tiam li tranĉis kaj tranĉis, ĝis foje, jen li rimarkis, ke ankaŭ li mem komencas kanteti: "Benata tago de naskiĝ' de Kristo."

Antaŭe li ekfrapis sian buŝon, sed poste li ekkoleris, forpuŝis per piedo de sub si la seĝon, malfermis la keston, elprenis la milflorenan bankbileton kaj kuris kun ĝi al la unua eteĝo, al sinjoro moŝto.

— Bona sinjoro mosto! Mi petas humile vin, reprenu la monon, por ke ĝi ne estu la mia, por ke mi povu kanti, kiam mi deziras, ĉar tio valoras pli ol mil florentoj.

Kaj li metis la bankbileton sur la tablon kaj kuregis reen al la siaj, kisis ilin laŭvice, starigis ilin laŭvice kiel orgentubojn, sidiĝis inter ili sur sian malaltan seĝon, kaj ili komencis denove el sincera koro.

"Benata tago de naskiĝ' de Kristo."

Kaj tiel bonan, bonegan humoron ili havis, kvazaŭ tiu granda domo apartenus al ili.

Kaj tiu, al kiu la granda domo apartenis, iradis sola, en plena soleco tra siaj naŭ ĉambroj kaj meditis pri tio: kion havas aliaj homoj por ĝojo en ĉi tiu granda, teda mondo.

136 Mór Jókai (1825-1904) estis unu el la grandaj fabelistoj.de la mondliteraturo. Liaj verkoj ampleksas pli ol cent volumojn.

UZITAJ MALLONGIGOJ

□	Ĝin ne vidis la redaktoro
/	Montras varianton
BG	Bibliografia Gazeto
BI	Budapeŝta Informilo
BrE	Brita Esperantisto, La
DPr	DEK PRELEGOJ de Kálmán Kalocsay. Editoris A. Csiszár. Budapest: Hungara Esperanto-Asocio, 1985. 126 p.
EB	ETERNA BUKEDO. 260 poemoj el 22 lingvoj. Tradukis K. Kalocsay. Budapest: Literatura Mondo, 1931. 352 p.
EdE	ENCIKLOPEDIO de ESPERANTO. Red. L Kökény—V. Bleier, la lingvofakon K. Kalocsay. Budapest: Literatura Mondo, 1933-1934. Du volumoj. 600 p. + 184 bildopaĝoj.
EF	Esperanta Finnlando
EM	Eszperantó Magazin
HA/1	HUNGARA ANTOLOGIO. Poemoj kaj noveloj de 51 verkistoj. Redaktis kaj la poemojn grandparte tradukis K. Kalocsay. Budapest: Literatura Mondo, 1933. 470 p.
HA/2	HUNGARA ANTOLOGIO. Redaktis V. Benczik. Budapest: Corvina, 1983. 448 p.
HdE	Heroldo de Esperanto
HE	Hungara Esperantisto
HESL	Hungaria Esperantista Societo Laborista
HFM	Hungara Fervojista Mondo
HH	Hungara Heroldo
HV	Hungara Vivo
KONATIĜU	KONATIĜU KUN NI! Katalogo de Literatura Mondo, 1931.
LF	Literatura Foiro
LL	Lingvo-Libro

LM	Literatura Mondo
LSF	LINGVO, STILO, FORMO. Studoj de K. Kalocsay. Budapest: Literatura Mondo, 1931. 142 p.
MK	Monda Kulturo
MdĈ	LA MORTO DE L' ĈIELARKO. Elektitaj poemoj kaj artikoloj de E. Ady. Redaktis V. Benczik. Budapest: Hungara Esperanto-Asocio, 1977. 87 p.
NE	Nederlanda Esperantisto
NLR	Nica Literatura Revuo, La
NP	Norda Prismo
OL	ORA LIBRO DE LA ESPERANTO-MOVADO (1887-1937). Red. V. Bleier kaj E. Cense. Warsawa: Loka Kongresa Komitato de la XXIX-a Universala Kongreso de Esperanto, 1937. 221 p.
(Pl)	Postlasita verko de K. Kalocsay.
TS	TUTMONDA SONORO. Poezia antologio en Esperanto. 581 poemoj de 185 aŭtoroj. Tradukis K. Kalocsay el 30 lingvoj. Red. V. Benczik. Budapest: Hungara Esperanto-Asocio, 1981. 664 p.
UTAM	UTAM A VILÁGBAN/MI VIZITIS MIAN FARMON. Antologio el la Esperanta literaturo. Red. M. Gergely. Budapest: Európa Kiadó, 1987. 304 p.
VL	VILÁGIRODALMI LEXIKON (Mondliteratura Enciklopedio). Budapest: Hungara Scienca Akademio, 1978-1979.

INDEKSO DE PERSONOJ

En ĉi tiu indekso la nomoj estas ordigitaj laŭ la simplaj literoj de la Esperanta kaj latina alfabetoj, se konsidero pri nacilingvaj supersignoj.

ADA (ps. de A. Atanasov) 19
Adamson, H. 4
Adams, W. G. 21
Ady, E. 8, 9, 24, 54
Alejhem, S. 19
Alighieri, Dante 11, 24, 25, 40
Applebaum, J. D. 18
Arany, J, 24
Archilochos 24
Ashley, A. L. 19
Asturias, M. Á 55
Auld, W. 4, 22, 24, 55
Azorín, F. 20
Babits, M. 19, 24
Baghy, Gy 11, 15, 24, 45
Balliman, J. 30
Balinski, St. 19
Balkányi, P. 8, 12, 14
Baranyai, I. 20
Barbusse, H. 34
Baudelaire, Ch. 24
Bein, K. (p.: Kabe) 24
Behring, E. 24
Belmont, L. (ps. de L. Blumenthal) 24
Benavente, J. 20
Benczik, V. 62-63
Bennemann, P. 18
Berveling, G. 40, 52
Bicknell, C. 24
Blake, S. 21
Bleier, V. 7, 11, 24, 49, 51, 62
Blond, G. 33
Boccaccio, G. 33
Bodó, K. 6, 7, 11, 19, 25
Bonsels, W. 19
Boucon, H. 20
Boulton, M. 4, 25
Bourdet, E. 33
Braun, F. 49
Braun, St. 25
Brieux 35
Brion, M. 33
Bruckner, F. 33
Brüggemann, K. 18
Bulthuis, J. H. 19, 25
Busoni, F. 54

Carco, F. 34
Catarzi, G. 52
Cense, E. 63
Cervantes Saavedra, M. de 32
Chateubriant, A. de 32
Chazan, S. 20
Claudel, P. 33
Clark, B. 29
Croisset, F. de 34
Csák, Gy. 56
Curry, A. L. 19
Ĉikarkov 54
Dalmau, D. 30
Degenkamp, G. J. 22
Deledda, G. 32
Déry, T. 56
Dietterle, J. 19
Dixelius, H. 33
Dixey, G. 20
Dolinský, J. V. 17
Drezen, E. 20
Dresen, H. 25
Duse, E. 31, 32
Emba (ps. de I. Baranyai) 4, 8, 25
Engholm, S. 5
Eörsi, I. 56
Eroŝenko, V. J. 25
Erasmus 33
Evans, C. 34
Fadjaev, A. A. 36
Fallada, H. 32
Farrére, C. 33
Fáy, D. 25
Firdusi 32
Földes, J. 34
Forge, J. (ps. de J. Fethke) 19
Fosca, F. 34
Foscolo, U. 33
Frank, B. 32
Fröding, K. 21
Füst, M. 55
Galambos, L. 56
Gallarati-Scotti, T. 32
Gárdonyi, G. 46
Gergely, M. 63
Ghez, A. 19
Giarodoux, J. 34
Gide, A. 34, 35
Giesswein, A. 25
Giltay, M. E. 21

Goethe J. W. 11, 29
Göhl, G. H. 20
Goldoni, C. 20.
Gorbatov, B. 54
Grabowski, A. 25
Grau Casas, J. 18, 25
Grenkamp (ps. de Salo Kornfeld). 8, 37
Grosjean-Maupin, E. 19, 25
Gyurkó, L. 55
Habi Sadi 55
Hajasi, F. 20
Haĵi, H. 21
Hankel, M. 25
Hauff, W. 18
Haugen, E. A. 13
Haupenthal, R. 12
Heine, H. 26, 55
Hekler, A. 49-50
Heltai, J. 42
Hemberger, S. 55
Hoffmann, H. 18
Hohlov, N. (ps.: Skito) 4
Holst, W. G. van de 20
Horatius, Q. F. 13
Hugo, V. 34
Ibsen, H. 13
Illés, E. 56
Illyés, Gy. 8
Iltis, A. E. 12, 53
Inglada-Ors, V. 20
Ishiguro, J. H. 20, 21
I. U. (ps. de Ito Saburo) 26
Ivans 21
Jandlová, M. 21
Janus Pannonius (ps. de J. Csezmicei) 26
Johansson, M. 22
Jókai, M. 54, 57
József, A. 26
Juhász, Gy. 26
Kabe (ps. de Kazimierz Bein) 6
Kampiss, A. 49
Karinthy, Ferenc 56
Karinthy, Frigyes 26, 47
Kassák, L. 26
Katkó, I. 55
Kazinczy, F. 26
Kende, I. 55
Kerschensteiner, G. 33
Kiss, K. 56
Kóbor, T. 54

Kodály, Z. 56
Kökény, L. 11, 26, 62
Kolozsvári-Grandpierre, E. 55
Korach, M. 55
Komját, A. 26
Kosztolányi, D. 26
Kozlowski, C. J. 26
Krestanoff, I. H. 18
Kristóf, A. 56
Kurzens, N. 12
Leeuwen, H. C. van 20
Legrand, E. 19
Leigh-Browne, F. S. 50
Lemaitre, J. 54
Lengyel, J. 56
Lenin, V. I. 37, 55
Leppäkoski, J. E. 22
Lessing, G. E. 18
Lindbom, T. 22
Lotti, P. 32
Ludw, K. 19
Madách, I. 9, 11, 26
Maimonido 33
Makai, E. 42
Mangada-Rosenörn, J. 21
Mazuranić, I. 20, 22
Mevo (ps. de R. Orengo) 20
Mihalkov, G.ps, (J. Modest) 9
Mikes, Gy. 56
Milosz, L. 33
Mimó-Espinalt, L. 23
Minor, K. 18, 19
Moldova, Gy. 56
Moliére 20
Molnár, F. 54
Mrázková, T. 21
Muusses, J. 53
Mussolini, A. 51-52
Mussolini, B. 51-52
Nakamura tazuo (ps.: Teruo Mikami) 21
Namil Lab (ps. de J. Balliman) 29
Navoj 35
Neergaard, P. 20
Neruda, P. 55
Nietzsche, F. 32
Oppenheim, P. N. 21
Ortutay, Gy. 55
Ossaka kenji 22
Ovidius P. N. 13
Palazzeschi, A. 34

67
Palotai, B. 55
Papini, G. 32
Papp, K. 29
Pavlenko, P. A. 35, 54
Pechán, A. 12
Petőfi, S. 8, 9, 12, 27
Pfeffer, E. 11
Pillath, F. 18.
Pirandello, L. 33
Plautus T. M. 13
Poe, E. A. 32
Pumpr, T. 27
Puskin, A. S. 27, 35, 54
Quarello, D. 22
Rabinovic-Tajc, J. 19
Radnóti, M. 27
Ragnarsson, B. 22
Ráth-Végh, I. 56
Régulo-Pérez, J. 13, 22, 27
Révész, B. 54
Rollet de L'Isle 21, 22
Rossetti, R. 22
Rostand, M. 33
Ruhm, F. 22
Salacrou, A. 34
San Secondo di R. 32
Sarment, J. 32
Sárosi, M. 45
Sartré, J. P. 35
Shakespeare, W. 13, 19, 27, 33, 35
Schoor, J. van 27
Schulhof, St. 18
Schwartz, R. 27
Schwartz, T. 46
Seppik, H. 19
Silfer, G. 11
Simon, I 56
Simonov, K. 35
Sinclair, U. 21
Sirk, H. 22
Skito (ps. de N. Hohlov) 48
Sofronov 36
Sós, E. 19
Ŝpicer, M. 20
Spitteler, C. 32
Stamatov, G. 18
Stefano Sankta reĝo 27
Szabó, D. 54
Szakonyi, K. 56
Szathmári, S. 7, 12, 27, 55

Szigeti-Kardos, E. 40
Szilágyi, F. 6, 7, 11, 27
Svobodová, R. 21
Sumín, J. 21
Swinburne, A. CH. 35
Tabi, L. 55
Tárkony/Totsche, L. 4, 6-7, 11,14, 17, 27, 30
Thorsen, P. 40
Tomán, M. 45
Topolansky, M. 22
Török, Gy. 53
Tótfalusi, I. 38
Tóth, Árpád 27
Totsche (vd Tárkony)
Tuglas, F. 18, 19
Turzó, P. 11
Valliene, H. 12
Vatré, H. 12, 56
Velebit, J. 22
Vergilius, M. P. 12
Verhaeren, É. 34
Verloren van Themaat, W. 40
Versteeg-Graftdijk, W. 21
Vestdijk, S. 34
Vilborg, E. 23
Vondrouŝek, J. 22
Vörösmarty, M. 27
Waringhien, G. 4, 11, 21, 22, 23, 24, 26
Wels, G. H. 35
Wessel, M. J. 50
Wilde, O. 33
Winsor, K. 35
Woolf, V. 32
Wüster, E. 18, 19, 20
Zacsek, I. 45
Zamenhof, L. L. 2, 4, 6, 19, 28, 39
Ziková, M. 21
Zschoke, H. 18
Zweig, St. 33

SKIZA ENHAVTABELO DE LA SEKVAJ VOLUMOJ

ĈAPITRO 11
LINGVISTO KAJ GRAMATIKISTO

PROLOGO
LA NEOLOGO
Vortduelo inter Baghy kaj Kalocsay
Oleo al la fajro
Post la "anatemo". *Donacon mi volis doni al la esperantistaro...*
La fundamento kaj la palaco (Poemo de Kalocsay)
Batalhalto
"Danĝera vojo"
La oponantoj ne interpaciĝas
Argumentas Kalocsay
La elirvojo
Finvortoj
Novaj vortoj enkondukitaj de Kalocsay
Artikoloj de Kalocsay pri neologismo

EN LA ATA/ITA BATALO
Skiza historio de la batalo
Ekzameno de la "Budapeŝta ekzameno" de S. Szathmári
VOJAĜO INTER LA TEMPOJ (Librokonigo)
Kiu kaj kial murdis la itistan Gramat?
Studoj kaj artikoloj de Kalocsay pri la participa problemo en Esperanto

LA VORTTEORIO EN ESPERANTO
La "amata ĉevaleto" de Kalocsay
Rimarkoj pri la vort-teorio de Kalocsay (Studo de D. Blanke)
Studoj kaj artikoloj de Kalocsay pri la vortfarado

LA LINGVISTO KALOCSAY POLEMIKAS
La diskutemo de Kalocsay
Polemiko pri la apostrof-ekstermo
Rekomendo al Esperantaj poetoj (Poemeto de A. Logvin)
Argumentas Kalocsay pri esperanto. Letero al ĉeha profesoro (J. Marík)
Studoj kaj artikoloj de Kalocsay pri gramatikaj demandoj

LIBROKONIGOJ
LINGVO, STILO, FORMO
PARNASA GVIDLIBRO
PLENA GRAMATIKO de ESPERANTO
ESZPERANTÓ NYELVTAN
RENDSZERES ESZPERANTÓ NYELVTAN (Sistema Gramatiko de Eaperanto)
6000 FRAZEOLOGIAJ ESPRIMOJ HUNGARAJ-ESPERANTAJ. DOMFABRIKO

*

LINGVA REVIZIO KAJ GRAMATIKAJ KONTRIBUOJ DE KALOCSAY EN DIVERSAJ LIBROJ

ĈAPITRO 12
LA REDAKTORO KALOCCSAY.
LITERATURA MONDO — BUDAPEŜTA SKOLO

La Kaloĉaja redaktora metodo
Kiu estis la tradukinto?
Senekzempla aŭdaca entrepreno. "Refreŝigitaj floroj"
La polurita VESPERKANTO de H. Adamson (Letero de H. Dresen el Estonio)
"Ribelo" ĉe Hungara Vivo. (Anekdoto)
Ĉe la juĝisto (D-ro G. Karczag)
Literatura pretendemo de Kalocsay (D-ro I. Nagy)
Libroj redaktitaj de Kalocsay

*

Literatura Mondo. Revuo kaj eldonejo (Prologo)
Pri la naskiĝo de Literatura Mondo. (P. Balkányi)
Kalocsay rememoras... (Intervjuo de M. Gergely)
Kompletigo al la rememoroj de Kalocsay (B. Berceli)
Budapeŝta Skolo
Mozaiko pri la iama Budapeŝta itinero (H. Vatré)
Bibliografio

ĈAPITRO 13
EN LA ESPERANTA MOVADO

Enkonduko
Lia agado en la E-movado (Kronologie)
Kongresa runo (Poemo de Kalocsay)
ARĜENTA DUOPO (Librokonigo)
ORA DUOPO (Librokonigo)
DEK PRELEGOJ de K. Kalocsay (Librokonigo de M. Ŝaturová)

ĈAPITRO 14
RENKONTIĜOJ REMEMOROR

Memoroj (J. Vondroušek)
Vid-al-vide kun Kolomano (P. Thorsen)
Minora poeto memoras pri mondvoĉa bardo (M. Boulton)
La naskiĝo de geniulo (Poemo de M. Boulton)
Kolomano Kalocsay (V. Oljanov)
Vizito ĉe Kalocsay (Verloren van Themaat)
Renkonto ĉe Kalocsay (D. Blanke)
En somera mateno (F. Diego)
Vilhelmo, la konkeranto (O. Gály)
Lasta kafo kun Kolomano (G. Silfer)
Fundamenta kontribuo (O. Kníchal)
Mia konatiĝo kun Kalocsay (D-ro L. Dubravszky)
Kolomano Kalocsay, la helpanto (D-ro F. Jáki)
Kalocsay kaj mi – karmemora (t. Nakamura)
... Sed la printempo floras (A. Logvin)
Ĉu vin ne incitas tiu tasko? (A. E. Haugen)

El la Budapeŝta kajero (N. Andrianova)
Du renkontiĝoj kun Kalocsay. La lasta intervjuo (L. Kapitány)
Kelkaj rememoroj pri Kalocsay (H. Dresen)
Kalocsay kaj ni (H. Vatré)
La unua renkontiĝo (R. Rossetti)
Sur stuparo... (Poemo de G. Waringhien)
"Falis la gracia, branĉo de l' violo" (A. Csiszár)

ĈAPITRO 15
MORTIS KALOCSAY

Oficiala komuniko de HEA
La lastaj semajnoj de Kalocsay (L. Kökény)
El la "vivanta klasikulo" fariĝis "senmorta klasikulo"
La menso komprenas, tamen ribelas nia koro (Pri la enteriga ceremonio. E. Szigeti -Kardos)

Funebraj paroloj

Terenfalis alta arbego (J. Mátéffy, prezidanto de HEA)
Adiaŭo en la nomo de la Hospitalo László (D-ro J. Lévai)
La kordo abrupte rompiĝis (I. Rotkviĉ, en la nomo de UEA kaj Akademio de Esperanto)
Vi ripozu en paco! (D-ro I. Bácskai)

*

Listo de nekrologoj

Adiaŭas poeto-fratoj

W. Auld: *La torĉportinto*
A. de' Giorgi: *Rondeltribute — Al Kálmán Kalocsay*
A. Grigorov: *Forpasis Kalocsay*
L. Jevsejeva: *In memoriam*
A. Logvin: *Rekviemo*
J. Korínek: *Krevis la kordo*
J. Ph. Punt: *Non moritur, cuis fama vivit*
R. Rossetti: *Je la morto de kara amiko*
L. Tárkony: *Kalocsay*
G. Waringhien: *Adiaŭ al Kalocsay*

ĈAPITRO 16
LA POSTMORTA VIVO DE KALOCSAY

La poetoj ne mortas
Estas neeble... (Poemo de J. Balbin)
Raportoj:
- Instanco de Kalocsay-memorĉambro
- Stratnomigoj, inaŭgoroj de memortabuloj en Abaújszántó kaj en Miskolc
- Publika statueto en la naskiĝurbeto
- Festaj kunvenoj.
- Du memortabuloj en Máriabesnyő
- Jubilea jaro de Baghy kaj Kalocsay

Internacia Komitato por Honoro de K. Kalocsay
Postmorte aperintaj verkoj de Kalocsay
Fondo de la Amika Societo de D-ro K. Kalocsay
IN MEMORIAM DR. KALOCSAY KÁLMÁN (Librokonigo)

*

Ne subiru via suno! (Vortoj de la postvivanto)

ENHAVTABELO

ANTAŬPAROLOJ:
Al la 1-a volumo
Al la 4-a volumo

ĈAPITRO 9

LA PROZA VERKISTO

9.1	ENKONDUKO	1
9.1.1	Pseŭdonimoj, plumnomoj de K. Kalocsay	2
9.2	LA ESEISTO KALOCSAY (G. Mihalkov)	4
9.3	ESEOJ KAJ ARTIKOLOJ PRI LITERATURO	11
9.4	LA SEVERA RECENZANTO	14
	Letero al "La Vagabondo" (Poemo de K. Kalocsay)	15
9.4.1	Recenzoj de Kalocsay	18
9.5	PORTRETOJ VERKITAJ DE KALOCSAY	24
9.6	ESEOJ KAJ ARTIKOLOJ PRI LA ESPERANTA POEZIO	29
9.7	LA OBSERVANTO	31
9.7.1	Observ-artikoloj	32
9.8	ARTIKOLOJ PRI DIVERSAJ TEMOJ	37
9.9	DIINO HERTHA. (Librokonigo de E. Szigeti-Kardos)	39
9.9.1	Bibliografio	40

ĈAPITRO 10

LA PROZA TRADUKINTO

10.1	ENKONDUKO	41
10.2	LA PAĜIO DE L' REĜINO (Librokonigo)	42
10.2.1	Bibliografio	45
10.3	DU KOKCINELOJ; LA MONTRO (Librokonigo)	46
10.3.1	Bibliografio	46
10.4	MORGAŬ MATENE (Librokonigo)	47
10.4.1	Bibliografio	48

10.5 ARTHISTORIO I. (Librokonigo) 49
10.5.1 Bibliografio 50

10.6 VIVO DE ARNALDO (Librokonigo) 51
10.6.1 Bibliografio 52
10.6.1.0 Notoj kaj referencoj 52

10.7 ROZINJO (Librokonigo) 53
10.7.1 Bibliografio 53

10.8 PROZAJ TRADUKOJ DE KALOCSAY 54

10.9 EL LA FRUAJ PROZAJ TRADUKOJ DE KALOCSAY:
M. Jókai: KIUN EL LA NAŬ 57

UZITAJ MALLONGIGOJ 62
INDEKSO DE PERSONOJ 64
SKIZA ENHAVTABELO DE LA SEKVAJ VOLUMOJ 70

Eugeni S'Ors Katalana Antologio (1925)

... Min mapeltiĝis kontraŭ ĝi (= Esperanto) la ofte faratay laŭdoj pri ĝia simpleco. Mi ĉiam havis la Konvinkon, ke bona universala lingvo ne ~~[illegible]~~ devas esti simpla; ĉar nur ĉiam utilon alportus ĝia kono kaj nur ĉiu ĝi ŝparus ~~al~~ aliajn laborojn, por ke p valoro la perion venkitelhyĝa pliaj malfacilaĵojn en la